


1988 septembro
81-a jaro
n-ro 993 (9)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



Pri strategio,
hejme
en Roterdamo

Vi trovos,

ke la afero sendube progresas. Pensu ekzemple pri jeno: Neniam en la pasintaj cent unu jaroj okazis tiel, ke kvar sinsekvaj Universalaj Kongresoj altiris po pli ol du mil partoprenantoj. Aŭgsburgo surprizis, Pekino ŝokis, Varsovio jubilee rekordis — sed eĉ post tiuj antaŭsignoj, Roterdamo sukcesis spiti ĉies prudenton. Per nura rigardo al la landostatistiko de tiu ĉi “okcidenta” UK, klare evidentiĝas la kreskanta tutmondiĝo de la Movado.

Kelkajn klarigojn de tiu progreso vi povos trovi sur la sekvaj paĝoj, kvankam ne ĉiam nigrablanke presitajn. Spuroj troveblas en la festparolado de John Wells; en la diskutoj pri la kongresa temo; en la revigliĝo de ILEI kaj la pactaga rezolucio; en la Jubilea Festo; kaj eventuale aliloke, interlinie, kiel la fono al la kongresa konversaciado. La mondo evoluas, la Movado same. Ĉu niaj kongresoj eksekvos tiun modon?

Enhavo

- 141 73-a Universala Kongreso de Esperanto: Roterdamo enfokusigis niajn atingojn kaj latentojn
- 142 Solena Inaŭguro: “Bonvenon al via hejmo!”
Festparolado de John Wells: Ni vivas en historia momento
- 144 Movadologia simpozio: Ideoj ĝis agoj: la vojo longas
Nekrologo de Willem Drees (1886-1988)
- 145 Kongresa temo: Kia scienco, kiala kompreniĝo?
- 146 Kongresa rezolucio: Partopreni en respondeca disvolvado de la scienco
- 147 Tago de la Lernejo: Maratona mozaiko
Tago de la Paco: Servi al porviva informofluro
- 148 Internacia Kongresa Universitato: Multfaceta prelegaro
- 149 Jubilea Festo: De unika komprenilo al vehiklo de libereco kaj egaleco
- 150 Saluto de la Ĝenerala Direktoro de Unesko
- 151 Deklaracio de la Honora Patrona Komitato de Universala Esperanto-Asocio
- 153 Esperantologia Konferenco: Normoj gravas, ĉiukampe
- 154 Monda Esperanto-Centro: Bjalistoko duguldene, okfoje!
Libroservo: Kulmino de jubileaj streboj
- 155 Koncize pri ... (mallongaj kongresaj notoj)
- 156 Arta programo: Babilajo kun nefakulo; Nacia Vespero: “Kajto” estis perlo; Teatro: Fortas la BET-isma tradicio; Pupteatro: Plia bono el Bjalistoko; Internacia Vespero: Laŭdinda leĝereco; Filmo: Necesas tamen kompreneblo
- 158 Komitato: Inter seriozeco kaj tempoperdo
- 159 Kongresa Fermo: Regis familia etoso — ĉu do sukcese?
- 160 Kongreseroj ... (gajaj kaj similaj piednotoj)

La kovrilo

Strategio — la koncepto kunkrampis la 73an UK, malfermante ĝin ĉe la sabata Simpozio pri UEA, finante ĝin ĉe la sabata komitatkunsido unu semajnon poste. Kaj tia devus esti Universala Kongreso: okazo por planoj, diskutoj, kunparolado. Sed estas ankaŭ grave, ke tiu plej amasa Movada forumo kreskigu entuziasmon kaj solidarecon inter siaj ĉeestantoj — celo de UEA jam de ĝia fondiĝo. Kiam en la sekvaj paĝoj oni parolas pri hejme-co, pri familieco, oni celas la vortojn laŭ tiu senco, tute pozitiva. UEA restas universala kiel nia lingvo mem, ĉar iu ajn povas hejmiĝi en ĝi, se tiu venas preta akcepti, uzi kaj evoluigi ĝin komunume. Do bonvenas ankaŭ viaj ideoj pri strategio, reage ekzemple al la Strategia Plano, kiun proponos por via pripensado niaj kovrilaj prezidanto kaj Komitato, oktobranumero.

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3300; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la CO de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Neil Salvesen.

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, esploro kaj dokumentado): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744; telekso (5) 9103500242 ud.

Vicprezidanto (financa evoluigo): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (kulturo): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tôkyô, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.

Ĝenerala Sekretario (kunordigo de la funkciado de la asociaj organoj): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (landa, regiona, kaj faka agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Estrarano (scienca kaj teknika aplikado de Esperanto): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hungario; tel. (1) 316 423; telekso 225931 megy h.

Estrarano (eksteraj rilatoj): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Francio; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (kongresoj): s-ro Diccon Masterman, “Quasi in Cima”, Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendhal, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47.



73a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, ROTTERDAMO, 1988 07 23 - 30

Rotterdam enfokusigis niajn atingojn kaj latentojn

Nur sukceso montras al ni la limojn de sukceso. Per 2321 aliĝintoj el 63 landoj, la 73a UK, en urbo duoblasence mondhavena, konfirmis nian senprecedencan nombran forton. Ĝia escepte glata funkciado montris al la ebloj de profesieco — ĉar sendube estis la kombino de centra-oficeja sperto kaj nederlanda precizemo (flanke de la LKK kaj la kongreseja stabo), kiu tiel sukcese reĝisoris la programon. Plaĉis krome ties mikso de bilancoj kaj planoj — en Roterdamo oni metis finan punkton al la Jubilea Jaro; tie okazis simpozio pri UEA, novstilaj kunsidoj pri regiona agado, nenombreblaj diskutoj pri komisionoj kaj aliaj organoj, pli ol tridek kunvenoj de fakaj asocioj, la lanĉo de nova Strategia Plano. Ĉeestis reprezentantoj de la konstruota Bjalistoka Centro, same kiel anoj de la DLT-teamo el Utreĥto. Novo kaj malnovo miksiĝis ankaŭ aliloke: en la informaj-klerigaj aranĝoj (Internacia Kongresa Universitato, Esperantologia Konferenco, prelegoj pri Nederlando, vizitoj al entreprenoj); en la arta programo, kies eroj kvalitis de akcepteblo ĝis brileco; en la turismaj aranĝoj, kiuj inkluzivis maloftan ŝancon pilgrimi al la Centra Oficejo de UEA; en la furora Librofoiro. Kiel, do, kvalifiki tiun ĉi kongreson, kiu ŝajne proponis ion por kontentigi ĉiun lerninton de la Internacia Lingvo?

Ni dirus, ke Roterdamo estis samtempe unika kaj tradicia. Unika, ĉar temas pri kongreso kiun invitis kaj gastigis UEA, kies etoson inspiris tute speciala sento de hejmeco kaj kuneco. Tradicia, ĉar antaŭ tiu fono disvolviĝis scenaro karakteriza pri la postmilita Movado: malgranda aro de orientitaj, agemaj aktivuloj kiuj animas la podiojn, kelkcentopa partoprenantaro kiun disdividas la multtema programo, kaj granda plimulto de simplaj parolantoj, kiuj ĉeestas ĉar la akceptema kulturo de la UK estas (fakte) io rara kaj home valora en si mem. Ke ilin ne inspiras la nunaj ebloj de agado, ke la aktivularo restas ono de tio, kion ni bezonas por krei movade kaj movadi kree — jen la malnova problema, kies solvo des pli urĝas, ju pli la monda socio ekmalkovras nian signifon.

Pro tio estus troige, nomi Roterdamon la komenco de nova epoko, eĉ se oni ja tie antaŭenrigardis, diskutis, faris planojn por la estonteco. Maksimume temis pri la komenco de komenco. Ekzistas ĉiaj kialoj kredi, ke sur la vastiĝantan bazon de la parolantaro de Esperanto eblas konstrui ankaŭ pli dinamisman kaj funkcipovan Movadon; en tiu konstruo niaj kongresoj ludos nemalhaveblan rolon. Roterdamo tamen nur ekindikis tiun eblon. Restas al ni brajtone, havane, interkongrese, *postroterdame* efektiviĝi ĝin.

La ĉi-paĝaj fotoj montras scenojn el la Centra Oficejo de UEA, kiu gastigis dum la kongreso amason da vizitoj, akceptoj kaj kunsidoj.



“Bonvenon al via hejmo!”

En Varsovio temis pri ses mil homoj; en Roterdamo pri iom pli ol du mil. Sed ne sekaj statistikoj solaj klarigas la intimecon de tiu ĉi inaŭguro; ankaŭ ne la feliĉa manko de ekstermovadaj diplomatoj kaj similaj, pro la Jubilea Festo poste en la semajno. Temis precipe, kiel atentigis la prezidanto de UEA en siaj unuaj vortoj, pri ia hejm-etoso: ĉar kiu movadano ne sentas iun gradon de ligo al tiu domo en Nieuwe Binnenweg, kie interalie oni tajpis — kelkajn semajnojn antaŭ via lego de ili — ĉi tiujn vortojn?

“Pilgrima kongreso” do nomis ĝin d-ro Tonkin, kadre de bonvenigo en kiu li alvokis al aktiva partopreno en la semajna programo. Kunplani la agadon de UEA, kundiskuti la kongresan temon, ĉeesti la Unuan Ĝeneralan Kunsidon kaj la Jubilean Feston, subteni la iniciatojn de la Bialistoka Centro, profiti de la multaj klerigaj aranĝoj — ja multos la ebloj. La kunlaboremon kaj helpemon de la LKK-teamo cetere certigis ĝia prezidanto Ans Bakker-ten Hagen. “Nur la veteron ni ne diktas,” ŝi klarigis, aludante humure la fulmoŝtormon de la Interkona Vespero.


Post du jaroj de iom fenomenaj Altaj Protektantoj, en Pekino kaj Varsovio, tiu ĉi jaro reiris al formala, distanca apogo: la nederlanda ĉefministro, Ruud Lubbers, sendis la mesaĝon reproduktitan ĉi tie. La parlamenta prezidanto tamen daŭrigis fortiĝantan tradicion de ĉeesto: vd. p. 149.

Al internaj aferoj de la Movado kaj al ties rilato al la mondo revenis UEA-estrarano Ottó Haszpra en sia enkonduko al la kongresa temo, “Scienco kaj tekniko por internacia kompreniĝo”. Lian pledon por pli da atento kaj respekto al la uzo de Esperanto por sciencista komunikado vi trovos resumita sur p.145; ĝi renkontis, ni dirus, akcepton sed ne entuziasmon ĉe la aŭskultantoj. Tio ne mirigas, cetere: kial la “du mondoj” de la neesperantista publiko — la scienca kaj la nescienca — ne portus sian dividon enen de la Movado? Jen eventuale plia temo por estonta UK...

Plaĉa harpa interludo de Saskia Veen (kies aliajn talentojn, cetere, eluzos la organizo de la venontjara, nederlanda IJK) enkondukis la salutojn al la ĉeestantaj Honoraj Membroj de UEA. Inter tiuj mankis, bedaŭrinde, la gajninto de la dua Premio Deguĉi por per-Esperanta pacagado: Ralph Harry, interalie eksa aŭstralia ambasadoro ĉe UN, kies vivlaboron oni aparte honoris poste ĉe la Oomoto-kunsido.

Post vakerĉapela saluto de la ĝenerala sekretario de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (pri kies 44a Internacia Junulara Kongreso en Zagrebo raportos la oktobra numero de *Esperanto*), la ĝenerala direktoro de UEA enkondukis neatenditan gaston per la vortoj: “Se ni estas efektive amika rondo, ni komencu per saluto de organizo, kiun oni ofte konsideras nia konkuranto.” Temis kompreneble pri Sennacieca Asocio Tutmonda, kies sprita reprezentanto substrekis la multajn komunaĵojn inter SAT kaj UEA — sed ankaŭ emfazis la valoron de diverseco.

Diversecon certe montris la kvardeko da salutoj el diversaj landoj — kaj ankaŭ la stilo de la salutoj. Aŭstrio menciis, ke la Viena Radio plilongigis sian E-elsendon. Zairio ligis Esperanton kun la batalo kontraŭ rasismo. Usono raportis 35%-an kreskon en sia membraro, dum



Supre, la kongresa salonego-koncertejo perfekte taŭgis; dekstre, eminenta fonetikisto Wells festparolis intime.

Burundio kvazaŭ pardonpetis pro sia movada malgrandeco. Norvegio leĝere vortludis pri la vetero. Angolo kaj Italio verve alvokis al vigla agado. Inter la landoj frapis kelkaj nomoj preskaŭ nekonataj, kaj estus malfacile ne dividi la senton de Tonkin, ke “nia movado fariĝas pli kaj pli tutmonda.”

Simila penso estis nur unu el multaj en la ferma festparolado de d-ro John Wells. Jen la ĉefa parto de tiu konvene hejmsvila teksto, kiu tuŝis plurajn unikaĵojn de la nuna kongreso kaj la nuna jaro.

Ni vivas en historia momento

Estimata prezidanto, estimataj gekongresanoj:

Vi aŭdis jam multajn salutojn, kaj estas ja konvene en la inaŭguro de Universala Kongreso, ke oni salutu. Tiuj salutoj estis direktitaj al vi, al la kongresanoj. Mi nun volus saluti en kelkaj aliaj direktoj.

Unue mi volas saluti la urbon Roterdamo. Profesoro Tonkin jam nomis ĝin nia hejmo. Mi havis pli anatomian nomon por ĝi: ĝi estas la umbiliko de la Esperantomovado, ĉar tie estas nia Centra Oficejo. De la LKK ni aŭdis ke ĝi estas la fokuso de internacia komuniĝo. Vere, ĝi estas la krucvojo de Eŭropo, ĝi estas grava havenurbo, ĝi estas milionurbo, ĝi estas urbo detruita en la milito kaj tamen fenikse rekonstruita.

Mi salutas ankaŭ unu el ĝiaj filoj: mi salutas Erasmon. Li vivis antaŭ kvarcent jaroj, estas vere. Sed li estas tamen ia modelo de sciencisto, de klerulo kun internacia kompreno. Li estis botanikisto, sed li estis ankaŭ klerulo kiu kapablis editorigi gravan novan eldonon de la greka Nova Testamento. Li estis monaĥo, li estis pastro. Li estis profesoro en Kembriĝo, en Anglio; li estis profesoro en Bazelo, ĉe la svisa landlimo. Do li estis internacia homo, kaj pro tio oni prave nomis la premion Erasmo pro elstaraj kontribuoj al internacia kompreno...



Mi salutas ankaŭ la landon Nederlando, lando kiu havas fortan komprenon pri sia propra nacieco, kiu longe batalis por sendependiĝo, kiu havas brilan historion. En la 17-a jarcento ĝi estis mondpotenco finfine, kaj okupis gvidan rolon en la komerco, en la arto, en la scienco, kaj havis sian grandan imperion orientan kaj okcidentan. Poste ĝi elĉerpiĝis pro militoj. Fine ĝi estis eĉ okupita en la nuna jarcento. Nun ĝiaj kolonioj sendependiĝis, kaj ĝi devis serĉi novan rolon, kaj estas, mi dirus, denove en gvida pozicio en la scienco, en la tekniko, en la moderna mondo...

Nederlando estas ankaŭ la hejmo de unu el la plej gravaj evoluoj en la scienco kaj tekniko en rilato al la lingvo-problemo; ĝi estas la hejmo de BSO, kie oni evoluigas la sistemon DLT por maŝintradukado pere de la uzo de Esperanto kiel interlingvo. Post la brila inspiro de inĝ. Witkam kaj lia sukceso persvadi la firmaon entrepreni seri-

SALUTO DE LA ALTA PROTEKTANTO

Kiel nederlandano, mi estas ĝoja povi bonvenigi la 73-an Universalan Kongreson de Esperanto en nia lando.

Mi volonte pretis akcepti la Altan Protektantecon de ĉi tiu Kongreso. Ne pro tio, ke Esperanto en Nederlando bezonus protekton. Male — la mondo kaj la idealoj de Esperanto kaj esperantistoj en Nederlando ĉiam renkontadis multan simpatian, kaj nederlandanoj ludis tie elstaran rolon.

En la pasinta jaro vi fermis la unuan jarcenton de Esperanto. Mi deziras al vi, ke ĉi tiu kongreso estu sukcesoplena unua paŝo en la duan jarcenton.

R. F. M. Lubbers

Ĉefministro de Nederlando

ozan esploron en tiu kampo, li sukcesis atingi ke nun tiu projekto DLT estas en pinta pozicio almenaŭ el la vidpunkto de la eŭropa strebado pri la maŝintradukado. ... Kaj ĝi ja aplikas Esperanton en tute praktika maniero, kvankam tio estas maniero kiun Zamenhof certe ne pripensis, kaj kiun multaj el ni trovis surpriza en la komenco ... Tio havas ankaŭ gravan signifon por la evoluigo de Esperanto, ĉar finfine oni devas tute precizigi Esperanton por ke ĝi ludu tiun rolon, kaj tio povus esti utila al ni ĉiuj.

Do, mi salutas la urbon, mi salutas la landon; mi volus saluti ankaŭ la mondon. Ni vivas en rimarkinda momento en ties historio. La politika situacio en la nuna momento estas miraklo. Ĉu vi rimarkis, ke en 1988 eksplodis paco en la mondo? Kaj mi ne aludas al la fakto ke SAT estas reprezentata en kongreso de UEA. Ne: Usono kaj Sovetunio — la grandpotencoj — faris interkonsenton forigi mezdistancajn nukleajn raketojn. Tio estas la unua fojo ke oni konsentis redukti la nombron de nukleaj armiloj en la mondo. ... Tiu paco, kiu eksplodis, tamen, ne estas limigita al la akordo inter Usono kaj Sovetunio. En Afganio finiĝas la milito. En Irano, Irako oni akceptis la rezolucion de UNO por batalĉeso en la Golfo. En Angolo oni atingis akordon inter Sud-Afriko kaj Kubo kaj aliaj. La vjetnami-anoj forlasas Kamboĝon. Tio estas tuta modo kaj tendenco kiu estas vere esperiga ... Ni eble fine trovis ke en la moderna mondo la milito estas ne plu gajnebla; kaj kian perspektivon tio donas por Esperanto!

Ĉar restas dume la lingvoproblemo: la homaro estas ankoraŭ dividita per siaj diversaj lingvoj. Ni ne havas la eblecon rekte komuniki unu kun la alia, sen ke unu estu en supera kaj alia en suba pozicio, aŭ ke ambaŭ baraktas per fremda nacia lingvo ... Fine, do, mi salutas Esperanton, tiun etulon de 1887, bebo kiu kreskis ĝis tio, ke en la pasinta UK en Varsovio ni povis havi 6 000 homojn kune kiuj komunikis facile, glate, unu kun la alia per ĝi. Homa lingvo, nek maŝina lingvo nek kodo: En la epoko de informadiko, de elektronika redaktado kaj tiel plu, la bezono de komuna homa lingvo restas. Nia lingvo evoluis, kiel ĉiu normala lingvo. Ni raciigis ĝin kaj precizigis ĝin. ... La esenco, la kerno estas, ke Esperanto estas lingvo kapabla transpreni la rolon por kiu ni celas, ke ĝi estu uzata.

Esperanto do estas lingvo, kiu havas firman socian bazon. Vi estas ĝi, vi kaj ĉiuj esperantistoj. Se mi aŭ kiu ajn alia individuo havus la ideon ŝanĝi Esperanton — mi ne scias kiel, enkonduki amase novajn vortojn, ŝanĝi la gramatikon, ŝanĝi la prononcon — mi ne povas. Neniu el ni povas. Ĉar vi, ni, la granda socia portanto de Esperanto estas la bridantoj, la bremsoj, la garantio por vera lingvo, kaj pro tio Esperanto estas lingvo kaj ne projekto. Pro tiu socia bazo.

Tio signifas, ke mi salutas ankaŭ la esperantistojn. ... Mi salutas do la veteranojn. Mi salutas la spertajn esperantistojn. Mi ankaŭ salutas la komencantojn. Kaj speciale mi volas saluti tiujn, kiuj nun ĉeestas sian unuan Universalan Kongreson. Vi povos mem sperti tiun miraklon, kiun ĉiu el ni spertis siatempe, ke Esperanto ne estas ia teoriaĵo, kiun ni penis studi hejme el libroj aŭ en malgrandaj kursoj. Ĝi estas realaĵo. ... Nia tasko estas konvinki la mondon, ke nur per Esperanto — kiu estas samtempe facila por la lernanto, kaj neŭtrala inter la diversaj partioj kaj partianoj — nur Esperanto povos fine tiel solvi la lingvan problemon.

John Wells

Ideoj ĝis agoj: la vojo longas

“Malbona kompromiso”, unu el la ĉeestintoj nomis la unutagan simpozion pri UEA, kiu okupis la unuan kongresan sabaton. Efektive malkomfortis la programo, inter la duopa bezono informi la ĉeestantojn kaj rehavi de ili ideojn. Sed kiel bazo por daŭranta diskuto — i.a. per fotokopia, baldaŭ mendebla resumo de la tuto — la aranĝo valoris, kiel indikas la jena resumo.

Ulrich Lins kaj Humphrey Tonkin provizis tre utilajn enkondukojn, kiuj direktis ĉies atenton al la ebloj kaj nebloj de la organizaĵo UEA. Laŭ la germana historiisto, ia konstanta praktikismo — uzi la lingvon, ne pridiskuti ĝin — evoluis paralele kun konscio pri la ligoj inter la Movado kaj la internacia politiko, konscio kiun post la fondinto Hector Hodler plej flegis Ivo Lapenna. Samtempe, la streĉiteco inter UEA — kun ĝiaj individuaj membroj — kaj la landaj asocioj iom post iom solviĝis. Lins interalie vidas novan stadion malfermiĝi en la eksteraj rilatoj de UEA. Laŭ li, la politika sendependeco de la Asocio ekallogas aliajn organizaĵojn, pli ligitajn al ŝtata subteno, kaj — kiel montris reagoj al la rilato UEA – Monda Packonsilio — tio reaktualigas la bezonon de klare demonstrebla neŭtraleco.

Tonkin trafe resumis tri reagojn al la fermo de la unua jarcento: triumfo, skeptiko kaj ... nerva malstreĉiĝo, t.e. la sento, ke tiu limtrapaso efektive malfermas novan, ŝancoplenan epokon. La dubo restas, ĉu la movado kapablos sufiĉe profiti de ĝi. Pro tio li pledas por pli da atento al strategia planado; kaj mem prezentis tiukampan modelon: la Strategian Planon, kiun poste diskutis kaj ĝenerale aprobis la Komitato (p. 158 kaj sekvonta numero de *Esperanto*). Eĉ la baza formo de la Plano tamen ne kontentigas ĉiujn: en kaj la Simpozio kaj la Komitato aŭdiĝis unu-du voĉoj, pledantaj por filozofioj tute aliaj ol la ĝisnunaj.

Tiujn alvokojn plejparte ignoris la postaj prezentoj kaj diskutoj de la Simpozio, kiuj lokis sin firme en la tradiciaj fluoj de la movadologio sed celis tiujn pluevoluigi. Detlev

Blanke, ekzemple, argumentis por sistema atento al lingvo-profesiuloj kaj -studentoj flanke de la landaj asocioj, ĉar tiuj homoj kunformas la lingvan politikon de registaroj kaj organizaĵoj. Edward Symoens reskizis la bezonon de konsekvenca informa politiko, kiun akcentis jam la Movadologia Seminario de Bad Saarow en 1982. Kees Ruig volis pli da emfazo pri la profitokapablo de diversaj flankoj de UEA, kun laŭa restrukturado de ĝiaj organoj (li poste gvidis kongresan komisionon pri la temo). Pri ambaŭ temoj — informado kaj profesiigo — samopiniis Karen Lindquist rilate la landajn asociojn: ŝi proponis i.a. temojarojn, kiuj fokusigus ĉies atenton ĉe unu apartan celgrupon dum plenaj dek du monatoj. Kaj Tibor Sekelj prezentis planon de tutmovada kunordigo, kiu antaŭvidas agadon “samtempe sur laŭeble plej multaj kampoj, en laŭeble plej multaj landoj, konsiderante la homajn fortojn pri kiuj oni disponas.”

Demandosignojn tamen apudmetis Francois Lo Jacomo. Li atentigis pri la movada diverseco, kiu ne facile kanaliĝas en unusolan fluon pri ajna temo. En aparta interveno li ankaŭ pridubis la taŭgecon de UEA kiel kadro por “faka” agado, kiu aparte bezonas profesiecon kaj ne nepre kongruas kun la asocia strukturo. Li tamen vidis potencialan utilon en la interkonatigo de fakoj pere de interfaka revuo.

Kiel triamondanoj, Ĵila Saheb-Zamani kaj Probal Daŝgupto plej akre sentas la mankojn de la movada edukakultura agado, inkluzive ian unuflankecon. Daŝgupto proponis i.a. komisionon por interŝanĝo de spertoj, kiu konsciigus pri sociaj-kulturaj diferencoj rilate instruadon. Lia irana kolemino aparte emfazis la eldonajn bezonojn de la Tria Mondo: i.a. facilajn sed interesajn legaĵojn, kompetentajn scienc-teknikajn verkojn, kaj cedemon pri kopirajto. “La Esperanto-kulturo eksplicite inkluzivu la Trian Mondon,” resumis la diskutgrupo fine de la tago. Por inkluzivo pledis ankaŭ Renato Corsetti, ĉi-kaze pri la temo de mezaĝaj esperantistoj. Lia diskutgrupo, la plej malgranda — nur li kaj Zlatko Tišljarić — proponis komitatan komisionon, kiu okupiĝu pri helpo kaj instigo al esperantlingvaj familioj, i.a. per paralela UK-programo.

Plimulto de la diskutgrupoj ŝajne bone funkciis, eĉ se dum tro mallonga tempo — nur ĉirkaŭ unu horo restis je

Ĉe la Unua Ĝenerala Kunsido, dimanĉe, la Komitato kaj Estraro kunsidis antaŭ ducento da kongresanoj por aparte honori ses elstarajn movadanojn, forpasintajn dum la antaŭa jaro. En Esperanto vi jam legis pri Ivo Lapenna, Paul Neergaard, Pol Denoël, Yukiko Isobe kaj István Szerdahelyi; jen la lasta, kongreslanda honorito.

Willem Drees (1886-1988)

La historio pasas. Forpasis Willem Drees. Li naskiĝis en 1886, antaŭ la publikigo de la Unua Libro de Zamenhof. Dum multaj jaroj li estis membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. En 1954 li rolis kiel Alta Protektanto de la 39-a Universala Kongreso de Esperanto en Haarlem kaj dek jarojn poste li estis membro de la Honora Komitato de la 49-a UK en Hago (1964). Dum pli ol kvindek jaroj li estis membro de la Asocio de Laboristaj Esperantistoj (FLE).

Li estis longjare kaj longjara politikisto kaj granda paciganto. En la postmilita periodo li estis Ministro pri Sociaj Aferoj de Nederlando. Dum tiu periodo de konstruo, estis li kiu arkitektis la modernan socian ŝtaton en Nederlando. Interalie li kreis la nacian pensian sistemon — kaj poste vivis pli longe ol preskaŭ ĉiuj aliaj, kvazaŭ por ĝin elprovi. Li estis ĉefministro de 1948 ĝis 1958 kaj estas konsiderata la plej granda moderna nederlanda politikisto.

Drees estis kredanto je Esperanto kaj batalanto por egaleco tra sia tuta vivo. Pri Esperanto li iam verkis jene: “La mondo pli kaj pli unuiĝas kelkrilate; la kontraŭaĵoj pliakriĝis, sed pro la trafiko kaj la tekniko en la tuta mondo oni nuntempe interkontaktas. Oni devas, eĉ se provizore nur laŭvorte, lerni kompreni unu la alian, por ke en la daŭro oni sin komprenu ankaŭ en alia, pli spirita maniero. Trudiĝas la penso, ke ekzistas kunligiteco en la mondo kaj ke do devas esti, flanke de la naciaj lingvoj, monda lingvo. Mi estas konvinkita, ke la vojo al tiu celo konsistas en Esperanto. . . .”



Unu el la diskutoj pri la kongresa temo.

dispono inter la prezentoj kaj la finaj resumoj. Interesaj kaj potenciale utilaj konstatoj elvenis, similaj al la ĉi-supraj koncizigoj; tamen oni ree kaj ree frontis la duopan mankon de hom- kaj monfortoj. Restas esperinde, ke iuj partoprenintoj plu aktivus pri la ideoj, kiujn ili simpozie subtenis. Ĉar — kiel indikas la supra titolo — ideoj en si mem ne kreas ion: ili estas nur bazo por konstrua agado. Dum ni pluesploros pri kelkaj temoj en la venontaj revu-numeroj, indas memori kaj pripensi tion.

Mark Fettes (organizinto)

KONGRESA TEMO

Kia scienco, kiala kompreniĝo?

Scienco kaj tekniko por internacia kompreniĝo” — la kongresa temo malfermis vojon al tre larĝa debato pri la rilatoj inter Esperanto kaj unu el la plej gravaj fluoj de la moderna mondo. Prof. Ottó Haszpra, eminenta akvo-inĝeniero kaj UEA-estrarano pri scienca aplikado, prudente kaj tradicie enkondukis la temon en la Solena Inaŭguro:

“Nuntempe la homaro atingis tian evolustadion, kiam iu nepripensita ago povas kaŭzi la ekstermon de la homa specio kaj de la plejparto de la nuna naturo. . . . Ni havas la ŝancon ke atingante certan, kvankam ne absolutan, sed reale atingeblan nivelon de [amo kaj saĝo] — de nun ni parolu unuparte pri komprenemo, amikemo, pacemo, kulturemo kaj aliparte pri scienco kaj tekniko — ni kapablos eviti la pereon de la homaro kaj certigos por ni tempon ankaŭ por la realigo de vere homa vivo por ĉiuj popoloj de la terglobo. . . .

“Rilate al la scienca flanko de la evito de tiu detruado, oni eble povus diri ke la afero estas plej simpla: La scienco ĉesigu siajn fortostreĉojn, plej bone se ĝi ĉesigus sin mem, kaj detrua milito jam ne povos okazi. La sciencistoj lernu plugi la teron, aŭ ili eĉ ricevu bonan pension por fari absolute nenion.

“La afero ne estas tiel simpla. . . . Forigo de la ekzistantaj teknikaĵoj, ekz. el la agrikulturo, kaŭzus amasan

malsatmorton. Samtempe, interese, kaj la ankoraŭ ekzistantaj primitivaj kultivmetodoj kaj la unucelaj teknikoj povas rezultigi (kaj fakte jam multloke rezultigis) katastrofan poluadon kaj kompletan detruon de la viva naturo; do plua scienca-teknika evoluigo estas absolute necesa por protekti, eĉ evoluigi, tiun ankoraŭ vivan naturon, la tiel nomatan biosferon kaj ene de ĝi la biologian vivon de la homo mem. . . .

“La evoluigo de la scienco kaj tekniko pleje bezonas ankaŭ lingvan komunikadon. . . . Kaj ni ne forgesu, ke temas ne nur pri faka kompreniĝo pri sciencaj kaj teknikaj aferoj, sed ankaŭ pri homa kompreniĝo inter sciencistoj, teknikistoj kaj eĉ nefakuloj. . . . La solvo de la lingva problemo en la scienco estas ne nur scienca intereso, sed ankaŭ intereso, eĉ morala devo de la tuta Esperanto-movado. . . . Interne de la movado la kultivo de la sciencoj donas evoluigan efikon al la lingvo mem, dum eksterarilate la scienca aplikado donas al Esperanto reputacion kiun ĝia disvastigado bezonas.”

Jam kun alia emfazo, kvankam baze samopinie, parolis en la sama tago lingvisto Probal Daşgupto: unue kadre de la Unua Ĝenerala Kunsido, poste kiel enkonduko al la diskutgrupoj.

“[En la sesdekaj jaroj] ambaŭ flankoj de la generacia barilo en nia movado supozis, ke oni devas esti kaj uzi la sciencon, kiam oni laboras por socia celo kiel en la Esperanto-movado. . . . Se la industriaj landoj transmetu la teknikan kaj sciencon al la evolulandoj por helpi ilin evolui, necesas, ke ekzistu scio pri la arto de tia transmeto. Tio estas jam postulo pri teoria kompreno pri la evolado kaj pri la adaptado de sciencoj kaj teknikoj al malsamaj evoluŝtupoj. . . . Ne nur la sesdekaj jaroj, sed ankaŭ la pli lastatempaj sloganoj ‘Ni estu ne objektoj, sed subjektoj’ kaj ‘Ni laboru por alternativa kulturo’ spegulas tiun linion, kiu do restas la konsentaĵo de la Esperanta komunumo ankaŭ pli freŝdate. . . .

“Ni ĉefe lernas el la tradiciaj diskutoj, ke la scienc-teknikaj esploristoj devas akcepti respondecon socian kaj median, dum inverse la civitanoj, kiuj volas okupiĝi pri tiuj gravaj demandoj, havas la respondecon plibonigi sian sciencon kaj teknikan klercon. . . . Tiel ni iom post iom

pretiĝas por nova jarcento 21-a, [kiu] devos transformi la heredaĵojn de la homeco kaj de la scienceto en novan interkompreniĝon. . . .

“Oni komprenu, ke la naturo de la problemo estas alia en la nuna epoko, ol ĝi aspektis en la 60-aj jaroj. Tiutempe oni ankoraŭ cedis abstraktan ekziston al tiu moŝto Scienco, de kiu oni postulis servadon al la socio. Hodiaŭ oni komencas jam ĉe la rekono — dividata de multaj sciencistoj — ke la sciencistoj elektas siajn studendaĵojn laŭ sociaj interesoj kaj estas servopretaj al la socio kaj al la medio; oni nun, anstataŭ demandi ‘Kion faru la sciencistoj?’, demandas ‘Kion la publiko faru pri la scienco?’ Ĉi tiu demando rekte koncernas nin esperantistojn, ĉar ni estas ne nur publiko, sed ni estas ‘diligenta kolegaro’, ni estas fakuloj pri la evoluanta scienco de interkompreniĝo. . . .

“Jam Kant sciis, ke la internacia paco estas antaŭkondiĉo por la efika funkciado de la nacia kaj eĉ persona racio. Al tiu konsciiĝo ni povas aparte, kaj eĉ fake, kontribui . . . pri la internacia komunikado, kiu ne deiras de fiksaĵoj aŭ tradiciaj premisoj laŭ nacia deveno, sed bazas sin sur la komunika situacio mem, kaj ebligas, ke ni kune konstruu firman kaj sentrompan komunecon de kompreno.”

Nur 30-50 homoj partoprenis la diskutojn pri la temo dum tri kongresaj posttagmezoj. Al ilia malmulteco eventuale kontribuis, interalie, nesufiĉa emfazo pri la temo en la Dua Bulteno, Kongresa Libro kaj revuo *Esperanto*, kaj konkurenco de aliaj, foje similtaj programoj. Tamen ni revenas al la unuapagaj komentoj pri la kongresa karaktero . . .

Tra la diskutoj trakuris iuj konstantaj ideoj. Dum la unua tago, ekzemple, ekologiaj minacoj kaj ilia malrespekto al landlimoj prenis multan atenton. La kunvenoj poste decidis, ke en la dua kaj tria tagoj oni provu eviti troan emfazon pri tiuj jam vaste konataj problemoj:

pli kongruus kun la temo, okupiĝi pri la pozitivaj flankoj de la scienco kaj tekniko kaj ilia rilato al la Esperantomovado. Tamen la medi-detrua fantomo revenadis. Ĉirilate oni emfazis la bezonon de konsciiga edukado kaj de premo al la ŝtatestroj je ĉiuj niveloj, kaj ke, por senti respondecon pri najbara lando, oni bezonas interkomuniki kun ties loĝantoj. Ankaŭ du-naciaj solvoj ne eblas: la problemoj estas laŭnature multlandaj. Tiurilate potenciale gravas Esperanto.

Tamen necesas ke ankaŭ la esperantistoj orientiĝu pri ekkonoj de la scienco, ekzemple pri la tendenco al malpli reduktismaj teorioj, kaj ankaŭ pri la (mal)kapabloj de la scienco prognozi la sekvojn de ĉiuj agoj. Kaj tiu konscio ne limiĝu je la natursciencoj aŭ la ekonomikistoj: ĝi ampleksu sociologion, psikologion, politikologion ktp. Estus danĝere kredi, kiel proponis Daŝgupto, ke esperantistoj estas jam nature fakuloj pri ia nova fako de kompreniĝo — ankaŭ aliaj kontribuoj necesas. La ambicio ŝanĝi la homojn aŭ solvi aliajn problemojn ol la movadajn povas krome malhelpi nian progreson. La ligo inter scienco-tekniko kaj Esperanto estas finfine simpla: moderna lingvo kiu ambicias esti tutmonda evidente ne povas malhavi sciencteknikan literaturon, kaj endas vidi tion kiel investon — nun eble deficitigan — por ĝia estonteco.

Pli-malpli tiel disvolviĝis la debato, kompreneble kun multaj ĉirkaŭiroj kaj flankeniĝoj. Ĝi estis multrilate interesa, kaj estas bedaŭrinde ke ĝia enhavo plene evidentiĝis nek ĉe la Dua Ĝenerala Kunsido — kie debato ne vere ekfunkciis — nek en la kongresa rezolucio, en kies formulado ĉefrolis kun Haszpra kaj Daŝgupto ankaŭ Ulla Luin (Svedio). Ĝi kompreneble devis esti konciza, sed certe eĉ “racia pensanto” rajtas demandosigni la ombrelan apogon al (ĉiaj?) “scienco kaj tekniko”, por kiu pledas la rezolucio, kaj la netan distingon inter “rezultoj” kaj “aplikado”. Sed rezolucioj estas strangaj bestoj, kaj ni lasas la interpreton de tiu ĉi al la sekvintoj de la supra diskuto.

KONGRESA REZOLUCIO:

Partopreni en respondeca disvolvado de la scienco

La 73-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 23-a ĝis la 30-a de julio 1988 en Roterdamo,

diskutinte diversajn aspektojn de la rolo de la scienco kaj tekniko en la formado de la estonteco de la homaro, kaj

konstatinte — kiel aliaj racie pensantaj homoj ĉie en la mondo — ke la plua disvolvado kaj paca aplikado de la scienco kaj tekniko estas nemalhavebla bazo por la evito de la detruigo de la biosfero, por la saĝa mastrumado de la naturaj provizoj, por la sekurigo de sanaj biologiaj vivkondiĉoj kaj por la plua socia kaj kultura evoluo de la homaro; krome, ke la sociaj kaj naturaj sciencoj kaj la scienca tekniko estas laŭesence internaciaj kaj plej altgrade bezonas senperajn, vastajn kaj facilajn kontaktojn, informo-interŝanĝojn, vivajn diskutojn kaj homan interkompreniĝon tiel inter siaj kultivantoj kiel inter tiuj kaj la nesciencistaj amasoj,

konkludis, ke la esperantistaro devas tutanime apogi la pluan disvolvadon kaj disvastigon de la scienco kaj tekniko kaj — kune kun la neesperantistaj amasoj — aktive partopreni ĉiunivele en la diskutoj pri, kaj agoj por, la konscienca, respondeca kaj plej celhava aplikado de ties rezultoj;

refirmigis, ke la Rezolucio pri Faka Aplikado akceptita okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Pekino en 1986 — kiu pleje emfazis la neceson pri la intensa utiligo de Esperanto en la sciencoj kaj tekniko kaj pri la aktiva kunlaboro ankaŭ en kaj kun la neesperantista scienca medio — estas ĝusta, kaj ke ties plenumon UEA kaj ties membroj devas pli intense daŭrigi kaj sukcesigi.



TAGO DE LA LERNEJO

Maratona mozaiko

Nura cento da kongresanoj spertis, post enkonduko de la prezidanto de ILEI, maratonan tri-horan mozaikon de novaĵoj el la eduka mondo, prezentitaj de dudeko da intervenintoj. S-ino Szanser raportis pri la unua metodika kurso pri instrurajtigo, ĵus sukcese okazigita en Svislando. Sekvis raportoj el tri afrikaj landoj (Tanzanio, Centrafrika Respubliko kaj Ruando) pri lokaj kluboj kaj instru-klopodoj. La aplikon de teknologio al instruado skizis Zs. Barcsay (vidbenda kasedo, kiu prezentas ok model-lecionojn) kaj I. Koutny (uzo de parol-sintezo en komputila instruado). La heliĝantajn perspektivojn por instruado en Sovetunio prilumis A. Melnikov, aldone al aktualaj raportoj pri universitataj fakoj en Budapeŝto kaj plurloke en Ĉinio. Metodikajn intervenojn plenumis S. MacGill kaj D. Keefe; novaj oficialaj ekzamen-eblecoj en Germana DR kaj Britio estis skizitaj, kiel ankaŭ la planoj de ILEI modifi kaj larĝigi la Internaciajn Ekzamenojn de UEA/ILEI. Apelacio por pli da membroj en la Instruista Ligo kaj informoj pri ĝia venonta konferenco en Kimrio, tuj post la venonta UK, kompletigis tiun matenan sesion.

Posttagmeze la aranĝo prenis alian formon kaj traktis la temon "La ĝustaj formoj de la lerneja politiko koncerne la oficialan enkondukon de Esperanto en lernejojn". Ĝin enkondukis s-ro Edward Symoens, post kio la kvindek-kapa publiko dividiĝis en tri grupojn por diskuti diversajn aspektojn de la problemaro, kaj horon poste protokolitoj el ĉiuj grupoj resumis la diskutojn en la pleno.

La nova estraro de ILEI, elektita tuj antaŭ la 73-a UK ĉe la konferenco en Kerkrade, estas jena: prezidanto, Edward Symoens (kunordigado; informado en pedagogiaj medioj; rilatoj kun Unesko, UEA kaj aliaj institucioj); ĝenerala sekretario, Audrey Childs-Mee (rilatoj kun sekcioj, mem-

broj kaj UEA; internaciaj korespondaj kursoj; pedagogia prizorgo de infanaj kongresetoj; adreso Postbus 25041, NL-3001 HA Rotterdam, Nederlando); vic-prezidanto, Stefan MacGill (lerneja projekto; statistiko de lerneja instruado; Internaciaj Ekzamenoj kaj iliaj kursoj); kasisto, Bertil Andreasson (financa administrado; financaj rilatoj kun sekcioj, ILEI-konferencoj kaj aliaj organizaĵoj; adreso Södra Rörum pl 455, S-242 94 Hörby, Svedio); vic-sekretario, Malcolm Jones (venonta konferenco; lernejana korespondado; unuecigo de naciaj ekzamen-sistemoj); aliaj estraranoj, Zhang Danchen (sekcioj kaj evoluo en Azio, Afriko kaj Latinameriko) kaj Till Dahlenburg (gvido de la pedagogia komisiono de ILEI; Internaciaj Ekzamenoj; Superaj Metodikaj Kursoj; Internaciaj Metodikaj Seminarioj).

Aliĝoj al ILEI: 40 svedaj kronoj jare, al la kasisto aŭ pere de UEA.

Supre: Edward Symoens, nove elektita prezidanto de ILEI, dividas la podion kun Stefan MacGill kaj Audrey Childs-Mee. Sendepende de la sukceso ĉe lernejoj, la instruado de Esperanto ekeniras pli viglan kaj internacian epokon.

TAGO DE LA PACO

Servi al porviva informofluo

Ĉirkaŭ 120 homoj partoprenis la ĉi-jaran pac-forumon, kiu havis la temon "Paco, ekologio kaj socia justeco". Referantoj el diversaj landoj kontribuis per prelegoj kaj kantoj. Unu el la kantoj (iom maloportune verdstelisma por aranĝo, kiu ideale rigardus *ekster* nian movadon por lerni de aliaj) estis speciale farita por tiu tago. Filmoj el kvin landoj kontribuis al la programo.

La ĉeestantaro en rezolucio substrekis la prioritatecon de "pozitiva evoluado de la vivo pere de reciproka respekto al

ĉiuj estaĵoj kaj naturaj leĝoj”, kaj ke Esperanto aparte taŭgas kiel perilo de tiaj informoj. Ĝi do proponis starigon de UEA-komisiono pri mediprotektado kaj socia justeco, kaj ke la Asocio eldonu broŝurserion pri tiuj temoj.


INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO

Multfaceta prelegaro

Kiam, kelkajn minutojn post la anoncita horo, ankoraŭ mankis ĉe la malfermo de la 41-a sesio de IKU ties rektoro, prof. Jan Knappert, ties unua preleganto, William Auld, kaj la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, oni povis timi fiaskon de la tuto. Sed fine nur Auld ne povis veni, pro familia malsano, kaj Tonkin utile anstataŭis lin per duon-spontana tezado pri la Esperanta literaturo. Rektoro Knappert (Nederlando/Britio), eminenta specialisto pri la afrikaj lingvoj, ankaŭ tuŝis literaturon en sia enkonduko, kiam li pledis por libroverkado — “pri scienco,

jen la reviviĝon de la hebrea lingvo, jen la disiĝon de parola kaj skriba idiomoj ĉe la araba; lingvon ĝenerale, kiam Probal Daŝgupto (Bharato) klarigis novan rigardon al la rilatoj inter la gramatiko kaj la parola medio, per analizo de la indika (aŭ indica) funkcio de diversaj lingvaj elementoj; lingvoplanadon, kiam Vera Barandovská (Ĉeĥoslovakio) skizis la evoluon de la lingva penso de Komenio, kulminantan en lia verko “La unua provo pri nova harmonia lingvo”, kaj prikomentis lian zamenhofecan filozofion. Toon Witkam (Nederlando) prezentis la lastajn evoluojn kaj planojn de la per-Esperanta traduksistemo DLT, kaj Ilona Koutny (Hungario) parolis i.a. pri la teorio kaj praktika signifo de sia sistemo ESPAROL, kiu ebligas al komputilo eldiri Esperantajn tekstojn; Humphrey Tonkin (Usono) faris duan, ĉi-foje antaŭviditan prelegon pri la rolo de universitatoj en pristudo de internaciaj lingvaj problemoj. Pri la internaciisma efiko de translima komerco parolis Werner Bormann (FR Germanio), argumentante ke la unueciĝo de la monda ekonomio kondukas al interdependa kaj kompreniĝanta mondo.

Dum al la rando de la universo portis la aŭskultantojn Hans Michael Maitzen en sia prelego, kiu priskribis la



De maldekstre: Vera Barandovská, Arpád Máthé, Werner Bormann, Toon Witkam klarigas IKU-e.

filozofio, biologio, religioj kaj ĉiuj aliaj temoj de la intelekta mondo . . . librojn de profundsensa enhavo, kaj poemojn tiel belegajn ke tuta la mondo volos legi ilin.”

Sufiĉe multajn temojn de la intelekta mondo tuŝis la sekva dudeko da referaĵoj. Pluraj traktis esplorkampojn aparte interesajn al esperantistoj: lingvojn, kiam John Wells (Britio) kondukis la aŭskultantojn tra Okcidenta Azio, substrekante jen la gravecon de la fenicia alfabeto,

teknikon kaj la celojn de la plej modernaj teleskopoj, konkretajn terajn problemojn tuŝis hungaraj sciencistoj Arpád Máthé kaj Ottó Haszpra, per fake spertaj referaĵoj pri la rilato de mediprotektado al la kemio kaj la akvo-inĝenierado respektive. Pri kongreslandano parte temis la prezento de María Rafaela Urueña (Hispanio), kiu komparis la meritojn de la nederlandano Hugo Grotius kaj la hispano Francisco de Vitoria por la fonda de la internacia juro — konkludante, ke ambaŭ kleruloj lokiĝas en la sama intelekta fluo, malgraŭ la frapaj malsimilecoj en siaj vivoj. Ankaŭ Vilmos Benczik (Hungario) elektis kapklini al la gastiga lando, traktante la kvar Esperantajn romanojn de Hindrik Jan Bulthuis, “poeto de la realeco”, kiu sciis senpene krei, kiel la fonon al siaj plej sukcesaj verkoj, la trankvilan etoson de frujarcenta nederlanda vilaĝo.

Ĉeestis po kvindek ĝis cent homoj, nombro tre taŭga por postprelegaj diskutoj; nur la tempo ofte ne sufiĉis al la intereso de la partoprenantoj. Releviĝas la demando, ĉu ne indas de tempo al tempo kolekti kaj eldoni la referaĵojn, kiel oni faris en la sesdekaj jaroj? IKU certe povus pli laŭmerite kaj konsekvence kontribui al la faka evoluo de Esperanto, se ĝiaj aktoj haveblus en presa formo kaj ne nur fotokopie, laŭpete (kaj laŭpage) de la Centra Oficejo.

ESPERANTO '88 • 27 nov.-4 dec. 1988 • Havano, Kubo

Internacia konferenco por la evoluo de Esperanto en Iberameriko

PROGRAMO:

- prelegoj kaj diskutoj kun elstaraj figuroj de la Movado
- interŝanĝo de spertoj kaj ideoj por movada kunlaboro
- artaj kaj distraj aranĝoj en amikeca, internacia etoso
- vizitoj al historiaj kaj aliaj turismaj lokoj en Kubo

VOJAGOO EL EŬROPO:

Flugu de via plej proksima internacia flughaveno tra Madrido.

Amsterdamo 1827 gld.

Frankfurto 2362 gld.

Kopenhago 2169 gld. (+ imposto)

Londono (Heathrow) 2036 gld.

Parizo (Orly) 2104 gld.

Foriro posttagmeze 26 novembro, reveno tagmeze 5 decembro.

La flugo rekte el Madrido kostas nur 1668 gld.

LOGADO EN HAVANO:

1-a kategorio 866 gld., 2-a kategorio 726 gld. (por kunulo: 1-a kategorio 766 gld., 2-a kategorio 626 gld.)

La prezoj inkluzivas por ĉiu persono 8 tagojn kaj 7 noktojn kun loko en 2-lita ĉambro, matenmanĝo kaj alia manĝo (“duonpensiono”), kaj transporto al ĉiu aranĝo.

Certigu vian partoprenon en ĉi tiu unika aranĝo. Mendu ĉe UEA, Roterdamo.

De unika komprenilo al vehiklo de libereco kaj egaleco

“Pasintjare ni festis la centjaran jubileon de nia lingvo, kaj hodiaŭ finiĝas la unua paŝo de ĝia dua jarcento. La plej grava kaj la plej promesa indiko kiun mi povas observi estas la kreskanta evoluo de Esperanto. Jes, mi konstatas: Esperanto vivas, ĉar ĝi progresas. Ĝi evoluas teknike, kiel lingvo; evoluas ankaŭ la ideoj kiujn ĝi vehiklas. La Universala Esperanto-Asocio, hodiaŭ okdekjara, montriĝas ankaŭ ĉiam juna...”

Marde, la 26an de julio 1988: antaŭ dumilo da esperantistoj el sesdeko da landoj, inĝ. Ludoviko Zaleski-Zamenhof — nepo de la iniciatinto de Esperanto — enkondukas la ferm-ceremonion de la Centjara Jubileo. Ĵus malaperis de super la scenejo la giganta ekrano, sur kiun oni projekciis lumbildan panoramon de la unuaj cent jaroj. La unuajn kongresojn, la unuajn librojn, la voĉon de d-ro Zamenhof mem, sekvis atestaĵoj pri posta progreso: la kresko de originala kaj tradukita literaturo, la fajraj paroladoj de Ivo Lapenna, la ekapero de muzikaj kaj aliaj tradicioj, la plimultiĝo de la movadanoj. Estis nekompleta revuo, kompreneble, sed tamen kuraĝa provo; kaj ian kompletigon sekve provizis la parolantoj:


“Kompare kun nia lingvo, samaĝaj inventoj, en kampoj tre diversaj, prezentas hodiaŭ eksmodigitajn teknikojn, kaj kelkaj samaĝaj filozofiaj pensoj aperas hodiaŭ ne plu bonvenaj al la nuntempaj kondiĉoj. La neŭtrala lingva fundamento, iniciatita en 1887 de la juna doktoro Zamen-

hof, tamen sukcesis adaptiĝi, restante konforma al siaj fundamentaj, teknikaj principoj... Certe, la kondiĉoj de ĝia aplikado ŝanĝiĝis. Ĝi ne plu estas la unika instrumento, por ke ‘ni komprenu unu la alian’. Ekzistas hodiaŭ diversaj lingvoj ŝajne konformaj al internaciaj kontaktoj en respondaj profesiaj kampoj kaj en respondaj geografiaj regionoj. Ekzistas eĉ lingvoj de komunikado inter maŝinoj, bone konataj de ĉiu ajn komputisto. Tial la kampo por Esperanto ne estu lingvo de maŝinoj, sed daŭre estu lingvo de homoj, servanta ilian ĉiutagan interkomprenon, ne necese konkuranta la anglan, la ĉinan, la hispanan aŭ la rusan en oficialaj internaciaj, aŭ, ni diru pli korekte, interŝtataj kunvenoj.

“La neŭtrala lingva fundamento estu lingvo interhoma. Anstataŭ ol strebi fariĝi instrumento de politikaj aŭ komercaj interŝtataj marĉandadoj, ĝi vehiklu la konvinkon de libereco kaj egaleco de ĉiuj individuoj, de ĉiuj homoj, sendepende de ilia har- aŭ haŭtkoloro, de iliaj politikaj aŭ religiaj ideoj, kaj de iliaj respektivaj gepatraj lingvoj. Tiamaniere ĝi daŭrigu kontribui al la ‘granda rondo familia’ starigita de doktoro Zamenhof, vivanta en paco, ĉiu ‘familiano’ ĝuanta plenajn homajn rajtojn.”

Multaj el ni emas konsenti kun la sinteno de inĝ. Zaleski-Zamenhof, ke ne tiom gravas la oficiala rekono kiom la reala uzo. Tamen ankaŭ tiu rekono estas bonvena, kiam ĝi venas, kaj la prezidanto de UEA prezentis notindan liston de diplomaciaj reprezentantoj kiel la sekva ero en la programo. Ĉeestis diplomatoj el Ĉinio, Danlando, Francio,

Profesia reĝisoradon bezonis la lumbilda spektaklo.



FR Germanio, Germana DR, Irlando, Japanio, Kubo, Pollando kaj Sovetunio, kaj kelkaj membroj de la kongresa Honora Komitato — inkluzive de d-ro Leibbrandt, prezidanto de la nacia Unesko-komisiono, kaj d-ro Dolman, prezidanto de la nederlanda parlamento (la “Dua Ĉambro”). Kiel atentigis Tonkin en sia prezento, d-ro Dolman eĉ televide esprimis sian “honton, ke mi ne parolas Esperanton”. Ĉu eblas esperi, ke li fariĝos same aktiva subtenanto de la Movado kiel liaj svedaj kaj polaj kolegoj? Kaj s-ro Bengtsson kaj s-ro Malinowski cetere sendis telegramajn salutojn, bedaŭrante ke politikaj devoj en iliaj respektivaj landoj malhelpis ilin ĉeesti laŭ siaj planoj.

La Ĝenerala Sekretario de UEA laŭtlegis ankaŭ kelkajn el la aliaj salutmesaĝoj, interalie de la Monda Federacio de UN-Asocioj, la nederlanda ambasadoro ĉe UN, la rektoro de la roterdama Erasmo-Universitato kaj Monda Pac-Konsilio. Tiam ankoraŭ ne alvenis la saluto de Unesko, kiun oni poste legis en la Kongresa Fermo. Ni tamen redonas la tekston ĉi tie, ĉar ĝi montras al io foje pridubata: ke la rilatoj inter la Esperanto-movado kaj la celoj de Unesko superas personajn, politikajn, tempajn limigojn. Povas fakte esti, kiel sugestis Ulrich Lins kadre de la movadologia simpozio, ke pluraj ĉe Unesko ekadmiras kaj envias movadon, tiel neligitan al ŝtataj subteno kaj politiko.

Tiu sendependeco speguliĝas ankaŭ en la Deklaracio de la Honora Patrona Komitato de UEA, kiun subskribis krome kvindek da movadanoj, okupantaj respondecajn poziciojn en la socia vivo de sia lando. Apud la tradicia emfazo pri la taŭgeco de Esperanto kiel ĝenerala studobjekto, la Deklaracio — legita kadre de la Jubilea Festo kaj prezentita apudapaĝe — rekte alvokas lerni la lingvon tiujn homojn, kiuj povus rapide kaj profite uzi ĝin. La listo de subskribintoj ja donas inspiran kaj kredemigan modelon, uzindan kie ajn oni bezonas montri la seriozecon de nia movado (kopioj haveblas de la CO kaj la landaj asocioj).



Al tiu listo aldoneblas la Internacia Patrona Komitato de la Centjara Jubileo, kies kunmeton oni iniciatis antaŭ kelkaj jaroj sed kiu iom flankeniĝis en la amaso de jubileaj taskoj. Ĝian ĉefan konsiston oni jam prezentis en la januara numero de *Esperanto* 1988, kaj la fina versio troveblas en la memorlibro de UEA, *Jubileo: Jarcento de Esperanto* (p.25). Ĉe la Jubilea Festo, la prezidanto de UEA povis ne nur laŭtlegi tiun liston, sed ankaŭ svingi nebinditan ekzempleron de la tuta libro, kun la promeso ke ĝi aĉeteblos du tagojn poste en la Libroservo.

Apero kaj koncertado de impone granda Infana Kongreseto — pri kiu vidu la oktobran numeron — prologis la finan paroladon de Tonkin, kiu celis per ĝi iel provizi bilancon al la Jubileo — aŭ, kiel li tion esprimis ĉe la movadologia simpozio, “meti strekon sub la historion kaj antaŭeniri”. Li aparte emfazis la malmonopolan rolon de UEA: “Nia revo ... mobilizi la tutan Esperanto-movadon en jubileaj preparoj ne realiĝis, nek realiĝis aliaj niaj komencaj paŝoj. Sed la moviĝo de la Esperanto-movado lige al la Jubileo komenciĝis spontane, rapidiĝis, kaj fine fariĝis torento da agado. Ĝin helpis gvida laboro de UEA kaj de aliaj organizaĵoj, sed ĉefe temis pri vere multflanka, multfaceta agado, kiu enplektis fine ne nur ‘niajn’ homojn sed efektive grandan parton de la ekstera publiko.”

Resumon de tiu agado Tonkin do prezentis, ekde la sofia rezolucio de Unesko en 1985 tra esperantologio, eldonado, filatelaĵoj, kongresoj, la mirinda informa ondo ĉe la amas-komunikiloj, kaj la grandaj iniciatoj pri Esperanto-centroj en Azio kaj Bialistoko. Multaj el tiuj bazaj informoj troviĝas ankaŭ en *Jubileo* (vd. p.152). De tie la prezidanto de UEA pluiris al la estonteco:

“Tiel ni paŝas al la dua jarcento. Kelkaj ne akompanas nin. Hieraŭ ni funebriis la pason de pluraj grandaj figuroj de nia movado — Drees, Lapenna, Neergaard, Denoël, Isobe, Szerdahelyi. Pli ol ĉiu ajn alia, Lapenna estis la arkitekto de la moderna UEA. Lia forpaso ĝuste fine de la unua jarcento de Esperanto levas grandan demandon antaŭ ni: Kiel pludaŭrigi en la duan jarcenton la laboron, kiun li komencis, kaj kiel uzi liajn sukcesojn kiel fundamenton por novaj, pli altaj atingoj?

“Grandas la figuroj, kiuj forpasis. Grandas la pioniroj de la Esperanto-movado, kiuj kontribuis al la progreso en la unua jarcento. Sed grandegas la fortoj haveblaj hodiaŭ — novaj, freŝaj fortoj; fortoj harditaj de la sperto; fortoj

TELEGRAMO DE LA ĜENERALA DIREKTORO DE UNESKO

Mi estas feliĉa, ke mi povas en la nomo de Unesko saluti la partoprenantojn de la 73-a Universala Kongreso de Esperanto, kiuj kunvenis en Roterdamo por solene fermi la Jubilean Jaron.

Unesko konsideras la esperantistan movadon kiel gravan faktoron de reciproka kompreniĝo inter la nacioj kaj de internacia kunlaboro kaj paco. Nia hodiaŭa mondo bezonas plifortigon de komunikiloj, bezonas komunan lingvon en reala kaj metafora sencoj.

Esperanto, kreita antaŭ 100 jaroj de d-ro Zamenhof, donis al la homaro facilan komunikilon, kiu dank’ al streĉa laboro de konvinkitaj esperantistoj fariĝis lingva komunikilo por milionoj da homoj tra la mondo.

Universala Esperanto-Asocio estis la motoro de tiu ĉi procezo, kaj pro tio mi deziras al ĝi kaj al ĝia tuta membraro tra la mondo plenan sukceson en viaj kongresaj laboroj.

Federico Mayor



Supre: pli ol 30 anoj de la Infana Kongreseto transĉenas la scenejon.

celkonsciaj kaj klarvidaj. La Jubileon faris ne unu homo aŭ kelkaj, sed ni ĉiuj. En tiu ĉi salono, malgranda parto de nia movado, troviĝas centoj da homoj, kiuj kontribuis al la Jubileo: per eldonaĵoj aŭ artikoloj verkitaj aŭ eldonitaj, per kontaktoj kun radio kaj gazetaro, per organizado de jubileaj kongresoj kaj konferencoj, per lokaj kunvenoj, per kontaktoj kun aŭtoritatoj kaj instancoj.

“Nia Esperanto vivas ĉar ĝi ĉie troviĝas — en Ĉinio, en Afriko, en la Amerikoj, en Eŭropo, en Oceanio. Nin ligas komuna lingvo, komuna idealo, kaj komuna laborkapablo. Jen la fortoj, kiuj transportos nin al novaj sukcesoj en la venonta jarcento.

“Kaj kion ni faru por pretigi nin por tiu ĉi nova jarcento? Ĉi tie en Roterdamo la Komitato de UEA pridiskutas novan Strategian Planon de UEA. Ĝi emfazos la instruadon de Esperanto, informadon pri ĝi, la praktikan aplikadon de la lingvo, kaj edukadon al tutmonda konscio, al la

Deklaracio de la Honora Patrona Komitato de Universala Esperanto-Asocio

Je la okazo de la 100-jara Jubileo de la Internacia Lingvo Esperanto,

<i>notinte</i>	la inviton de Unesko al siaj membroj, partopreni en la festado de tiu Jubileo,
<i>rimarkinte</i>	ankaŭ la grandan atenton, kiun Esperanto nuntempe ricevas, en la gazetaro kaj inter la intelektularo kaj ĝenerala publiko tra la tuta mondo,
<i>ni, sciencistoj, lingvistoj, politikistoj, diplomatoj kaj verkistoj,</i>	
<i>okupinte</i>	aŭ okupante respondecajn postenojn en la publika vivo de niaj respektivaj landoj,
<i>spertinte</i>	la neceson de komuna lingvo en internaciaj rilatoj por interkompreniĝo, paco kaj evoluo,
<i>lerninte</i>	Esperanton, kaj provinte ĝiajn kapablojn dum multaj jaroj,
<i>deklaras,</i>	ke Esperanto estas ne nur — pro sia simpleco, logiko kaj tuta strukturo — lingvo taŭga por ĝenerala lernado kiel dua lingvo por ĉiuj, sed ke ĝi jam fariĝis lingvo per kiu ni povas esprimi precize niajn pensojn en niaj propraj fakoj, kaj samtempe la riĉan kaj nuancitan pensadon de la literaturo, kaj
<i>tial</i>	ni rekomendas al registaroj kaj kompetentaj aŭtoritatoj kaj instancoj en ĉiuj landoj, same kiel al la sekretariatoj de interregistaraj kaj neregistaraj internaciaj organizaĵoj, kaj al ĉiuj profesiuloj, ke ili mem lernu la Internacian Lingvon kaj ebligu ĝian enkondukon en la lernejojn de la mondo.

La Honora Patrona Komitato de UEA konsistas el la jenaj personoj:

Ralph L. Harry (Aŭstralio), estinta ambasadoro de Aŭstralio ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko (prezidanto de la Honora Patrona Komitato);

Paul Ariste (Sovetunio), profesoro de la finn-ugra lingvo-scienso en Nacia Universitato de Tartu, membro de la Estona Akademio de Sciencoj kaj honora membro de la Finna kaj Hungara Sciencaj Akademioj;

Bakin (Ĉinio), verkisto, membro de la Konstanta Komitato de Ĉina Popola Kongreso, vicprezidanto de Ĉina Federacio de Literatura kaj Arta Rondo, aganta prezidanto de Ĉina Verkista Asocio;

Chang Choong-sik (Korea Respubliko), diplomito pri historio ĉe Seul-Nacia Universitato, prezidanto de la Universitato Dankook, prezidanto de la Korea Eduka Konferenco;

Chen Yuan (Ĉinio), direktoro de la Instituto pri Aplika Lingvistiko ĉe Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, vicministro en la Ŝtata Komisiono pri Lingvo, verkisto kaj eldonisto;

Ingemund Bengtsson (Svedio), prezidanto de la sveda parlamento, vicprezidanto de konsilio de la Socialdemokrata Partio, estinta ministro pri agrikulturo kaj labormarkato; **Willem Drees** (Nederlando), estinta ministro pri sociaj aferoj kaj eksĉefministro de Nederlando;

H. Lionel Elvin (Britio), estinta direktoro de la Departamento pri Edukado de Unesko, emerita profesoro kaj direktoro de la Instituto pri Edukado de Londona Universitato;

Harry Harrison (Usono), aŭtoro de sciencfikciaj verkoj, eksprezidanto de World SF, internacia organizaĵo de sciencfikciaj verkistoj kaj redaktoroj;


Vasil Peevski (Bulgario), Honora Prezidanto de la Internacia Federacio de Geodeziistoj, prezidanto de la Unuiĝo de Bulgaraj Geodeziistoj;

Miguel Sancho Izquierdo (Hispanio), honora rektoro de la Universitato de Zaragoza, membro de la Supera Konsilio de Sciencaj Esploroj;

Tadao Umesao (Japanio), ĝenerala direktoro de la Nacia Etnologia Muzeo, komisiito de la japana registaro pri kulturaj rilatoj eksterlande.

internaciista idealo. Ĝi atentigas ke ni ankoraŭ ne plene kaj plej efike utiligas niajn grandajn homfortojn, ke ni devas pli solidarece, disciplinite kaj (se mi rajtas tiel esprimi min) ĝoje labori por nia komuna celo. Mi esperas, ke la Komitato, post zorga konsidero kaj eventualaj modifoj, akceptos tiun ĉi planon, kiu donos al ni bazon por la estonta agado kaj fiksis niajn ĉefajn prioritatojn. Ĝi estos fleksebla plano, ŝanĝebla en estontaj jaroj, sed ĝia kombino de praktikaj celoj kaj gvidaj idealoj espereble ebligos koheran kaj celkonscian agadon en venontaj jaroj.

“Kial mi uzas la vorton ‘ĝojo’? Kial mi parolas pri idealoj? Ĉar, karaj gekolegoj, la laboro por Esperanto ne estas facila. Tiel bela, simpla kaj trafa ideo ofte renkontas mokojn, ofte trovas reziston, inter tiuj, kiuj kontentas pri la nuntempo aŭ, manke de propraj idealoj, ne povas agnoski ilin ĉe aliaj. Tiu bela ideo, tiu logika solvo, ne estas facile klarigebla al aliaj sen zorga konsidero de la argumentoj, kaj eĉ tiam ĝi povas kolizii kun la egoistaj aŭ malvastaj



interesoj de tiuj, kiuj ĝuas en la nuna lingva malegaleco avantaĝojn. Ne estas facile labori por tiel postulema mastro kiel estas tiu nia komuna lingvo: necesas respondi leterojn, skribi leterojn, interveni ĉe instancoj, varbi homojn por kursoj, instrui ankoraŭfoje la korelativojn, redakti, kunsidi, multobligi, telefoni, glui, ekspedi, protesti, kunordigi, pacigi, registri, kalkuli, kvitanci, protokoli — temas pri tuta terminaro de organizado kaj administrado.

“Sed tiuj verboj, tiuj operacioj, ne estas celoj, sed rimedoj; ne estas atingoj, sed operacioj. Disputi pri deta-

loj, trovi erarojn ekzistantajn aŭ neekzistantajn en protokoloj, krei ĵaluzon aŭ malpacigon inter la homoj, aŭ eĉ tiel kondukti, ke nur oni pravas, kaj neniel la aliaj — tiuj estas ofte la agoj de tiuj, kiuj perdis la ĝojon de esperantisteco; de tiuj, kies koro ne plu saltas je la unua kantado de la Himno en kongresoj; de tiuj, kiuj ne plu sentas tiun koncentrigon de la intelektaj fortoj kiam ili kun eksterstarantoj

La prezidanto de UEA tenas en siaj manoj apude unikan kronikon de la Centjariĝo. Temas pri tekstoj kaj bildoj el Ĉinio kaj Islando, el Brazilo kaj Japanio, Aŭstralio kaj Bulgario, Turkio, Togolando, Kanado, Irano, Francio, Kubo... Al la libro kontribuis Waringhien kaj De Kock, Auld kaj Daŝgupto, Lapenna kaj Neergaard, Piron, Régulo Pérez, Blanke, Lins... Entute nemalhaveblas —

jubileo jarcento de esperanto

Redaktis Mark Fettes. Roterdamo: UEA, 1988. 164p. 24cm. 72 paĝoj da fotoj. ISBN 92 9017 040 9. Mendu ĉe la Libroservo de UEA: 57,00 gld. plus sendokostoj. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

diskutas pri la meritoj de Esperanto. Tiuj estas la agoj de tiuj, kiuj perdis la grandajn celojn kaj faras celon el la propra pravo, el la propra venko.

“Pro tio, karaj gekolegoj, mi parolas pri ĝojo. Pro tio mi atentigas, ke la rutinaĵoj de la esperantista vivo estas nur punktetoj en tutmonda strebado de miloj da homoj — esencaj punktetoj, sed nepre konsiderendaj en pli granda kunteksto.

“Kaj la vojo estas malpli facila ol ĝi ŝajnas. Pli da pordoj malfermiĝas al ni (kiel mi ofte diras) ol ni kapablas trapasi. Pli da bona volo ekzistas inter tiuj kiuj ĝis nun ne aŭdis pri Esperanto, aŭ inter tiuj kiuj ne pripensis ĉiujn ĝiajn detalojn, ol ni imagas. Se venas rezisto, ŝanĝu la taktikon, aŭ aliru la celon laŭ alia direkto. Estu saĝe memkritika. Lernu mem pli bonajn kaj efikajn argumentojn. Kaj faru tion ĝoje, ĉar la celo de nia lingvo estas ĝoja celo. Havu kuraĝon, ĉar niaj antaŭuloj havis kuraĝon kaj ĉar la celo ĝin meritas. Trovu en ĉiu homo la bonan kaj ne insistu pri la malbono. Trovu tion, kio taŭgas; ne elstarigu tion, kio maltaŭgas. Kaj komune ni venkos la obstaklojn, kiuj staras antaŭ ni — ankaŭ la obstaklojn de ni mem levitajn.

“Mi esperas, ke vi ĉiuj iros hejmen fine de la nuna semajno refortigitaj. Mi esperas, ke vi forportos novajn sciojn kaj novan energion. Mi esperas, ke vi ne foriros kun intelekta valizo pakita de via propra pravo, etikedita nur de trafaj rebatoj en komitatkunsidoj aŭ de sukcesa dereligo de tiu aŭ alia ideo, kiun vi opinias malsaĝa. En via valizo estu scio, en via valizo estu novaj kontaktoj, en via valizo estu sento de membreco en internacia kaj interhoma socio, kaj la etikedoj estu etikedoj pri veraj pozitivaj atingoj kaj novaj planoj por la venonta laborperiodo.

“Kaj fine mi esperas, ke via valizo plenos je nova konscio pri la graveco de nia Universala Esperanto-Asocio, kiu tie ĉi troviĝas en unu modesta domo en Nederlando, sed kies influo disradias tra la tuta mondo kaj trans la jarcentoj de nia internacia lingvo.” ●

Normoj gravas, ĉiukampe

La matenan sesion de la ĉefa pri-Esperanta kongresero lanĉis la konata usona politolingvisto Jonathan Pool, kiu elektis nomi sian paroltemon "lingvoplaniko". Lia prezento celis ne nur klarigi la historion kaj metodojn de la studado pri la lingvoplanado, sed en la sama mallonga tempo disponigi al la ĉeestantoj gravan kaj interesan teoriar rezulton. Oni supozu, ke en iu parolkomunumo de diversaj etnolingvoj ekzistas unu interliga planlingvo, parolata de ĉiuj, kaj ke unu el la etnolingvoj (nomu ĝin Z) parolas granda malplimulto (eble 40%). Ni plue supozu, ke de tiu komenca stato la komunumaro povas evolui per tio, ke la homoj forgesas aŭ lernas unu aŭ pli el la lingvoj, agante laŭ sia individuisma interesopercepto, ĝis atingiĝas stabila ekvilibra stato en la komunumaro. Ĉe la simulado oni eltrovis, ke ne tre longan tempon post la komenca stato tre granda parto de la komunuma reto scios nur lingvon Z, aŭ sian etnolingvon kaj Z, kaj neniu plu uzos la planlingvon. El tio oni rajtas konkludi i.a., ke indas zorge pripensi la aliajn atentindajn faktorojn, kiuj en pli konkrete realisma modelo supozeble donus rezultojn pli konformajn al la aspiroj kaj premisoj de nia movado.

Daŭrigante laŭ la plano prezenti al la Esperanta publiko bildon de nunaj tendencoj en la lingvoscienco (kaj parenca) medio — al kiu la seriozaj esperantologoj devas adapti siajn studmetodojn — la dua preleganto, la bharata lingvisto Probal Daŝgupto, superrigardis la envortan gra-

Eble la ŝlosilan nocion de la mateno prezentis la fino de lia prelego, kiam li parolis pri la normodona rolo de la Esperanta parolkomunumo por la interlingvo uzata en la DLT-sistemo. Oni povus diri, ke en la modelo de Pool mankas ĝuste ia kuntena normeco, kiu stabiligus la restadon ĉe la interetne kompromisa planlingvo. Kaj la prezento de Daŝgupto indikis, ke la necesan mezon inter la skemismaj kaj naturalismaj tendencoj povas eltrovi nur la homoj mem, kiuj sin elmetas al la kontraŭaj peliĝoj kaj atingas stabilan, do norman, kombinon de la racia skemismo kaj la intuicia naturalismo. Tiel, ĉe la komunumo de parolantoj la socia kaj gramatika konceptoj pri la normeco renkontas la precizecon, kiun bezonas la nova, maŝina apliko de Esperanto.

Pri la evoluo kaj flegado de tiu normo temis la posttagmeza diskuto, en kiu surpodiis krom la prelegintoj ankaŭ Preben Bagger, Ilona Koutny kaj Victor Sadler, Pool kaj Sadler kredas je la ebleco de sukcesa lingvoplanado en Esperanto: la esperantistoj estas malanalfabetaj, havas modernajn komunikilojn, kaj konscias pri la lingvo, estante almenaŭ dulingvaj. Ankaŭ la tradicio aprobas la ideon de planado, kvankam diversas la sukceso de la proponoj. Koutny reformulis tiun fakton en demandon pri tio, kion komunumo trovas "ĝusta" en difinita tempo kaj loko.

Rilate al tiu ideo de ĝusteco, Preben Bagger opinias ke la Esperanto-komunumo estas malfermita kaj enlasas la "erarojn" de lernintoj pli libere, ol la etnaj lingvoj. Oni ne restas duarangulo en Esperanto — eĉ se oni estas "eterna komencanto" oni simple rolas kiel tia ano de etna lingvo-



matikon (morfologion) kaj la intervortan gramatikon (sintakson). Li konstruis sian prezenton ĉirkaŭ ia kontrasto inter la pli skemismaj kaj la pli naturalismaj teorioj de la moderna lingvistiko, kaj li proponis, ke oni imitu ankaŭ en la teoriado nian historian kompromison inter tiuj du ekstremoj, kiujn — lingvonivele — simbolas Volapük kaj Interlingua, respektive.

Prelegis lastvice la organizinto de la tuto, la germana gramatikisto d-ro Klaus Schubert, kiu estas ĉeflingvisto de la DLT-projekto de BSO en Utreĥto. Li skizis la historion de la maŝina lingvoprilaborado, kaj kompreneble emfazis la fakon de tradukado kaj la disvolvon de sistemoj, kiuj traktas en iu grado Esperanton. Kondukinte la aŭskultantojn al la nuna DLT-sistemo, d-ro Schubert donis perspektivon pri ĝia antaŭvidata evoluo, kiu espereble inkluzivos sisteman traktadon de la interfrazaj rilatoj en tekstoj kaj almenaŭ parte aŭtomatan produktadon kaj plibonigadon de la leksikologia scio en la tradukprogramoj.

komunumo, kiu ne bone aŭ norme parolas. Lingvoj kiel piĝinoj, aŭ kiel la angla en Bharatio, pli similas al Esperanto tiurilate. Daŝgupto, konsentante, plue formulis, ke ĉiu nova generacio de parolantoj de Esperanto iusence "rekomencas" la lingvon sur racie aspektanta bazo, tiel ligante la skeman planadon kaj la naturan evoluon.

Ĉe la intervenoj de la publiko, multan diskuton vekis la propono de Huĝimoto, ke oni en internaciaj renkontiĝoj aparte distingu la uzon de propra nomo per antaŭindiko kiel sinjoro aŭ sinjorino, por ke eventuale nesperta kunparolanto sciu pri la neceso pli atente aŭskulti. Li rekomendis, ke oni provu eviti la problemon per laŭebla uzo de apartaj Esperantaj nomoj en la Esperanta parolkomunumo. Lo Jacomo notis la neeblecon esperantigi ĉiujn loknomojn kaj raportis, ke li trovas ke li nekonscie adaptas sian lingvaĵon al diversaj kunparolantoj kaj ke tiel lia lingvouzo, kaj sendube same ĉe aliaj, evoluas al pli internaciaj normoj.

Bjalistoko duguldene, okfoje!

En la kongresejo funkciis ĝiceto, kie estis aĉeteblaj memoraĵoj kaj informiloj ligitaj kun la naskiĝurbo de Zamenhof kaj la projekto konstrui Mondan Esperanto-Centron. Tie oni povis vidi la unuajn arkitektajn planojn por la Centro. La Kongreson partoprenis urba delegacio, en kiu troviĝis i.a. vicvojevodo J. Slezak, urbestro Z. Zdrojewski, kaj prezidanto de la Bjalistoka Kultursocieto J. Jaworski. Tre sukcesis la varbado por la projekto, kiu ekfariĝas vere "nia", internacia. Furoris speciala, plene Esperanta numero de la bjalistoka ĵurnalo *Kurier Podlaski*, kaj ne malpli ties lotum-konkurso de senpagaj vojaĝoj al Bjalistoko. Ĉe la tirado dum la kongresa aŭkcio, bonŝancis Ghulam Nabi Parvaz (Pakistano), Hans Kästli (Svislando), Jantje de Vries-Vos (Nederlando), Hallgrimur Saemundsson (Islando), Esa Lång (Finnlando), kaj Henry Hugues (Francio). Al tiuj aldoniĝis du pliaj ĉe la Fermo (p. 159). Ekos internaciaj aranĝoj en Bjalistoko venontjare.



KOMITATA REZOLUCIO

La Komitato de UEA:

aŭdinte raporton pri la proponata Centro Zamenhof en Bjalistoko kaj ricevinte diversajn skribajn informojn kaj raportojn dum la jaro;

rimarkinte, ke la Centro povus digne honori la memoron de d-ro Zamenhof kaj liaj samtempoj, antaŭenigi la instruadon kaj studadon de Esperanto kaj Esperantologio kaj fortigi la Esperanto-kulturon, subtenas la kunlaboron de UEA en tiu ĉi projekto, esprimas sian pretecon kunlabori en la serĉado de monrimedoj por la programoj de la Centro, kaj komisias la prezidanton kaj ĝeneralan direktoron daŭre okupiĝi pri la projekto, reprezentanti UEA en la estraro de la Fondumo Ludoviko Zamenhof, kaj raportoti al la Komitato de tempo al tempo pri la progreso de la planoj.

Maldekstre, amasa aĉetado ĉe la Librofoiro; sube, la kupono de iu bonŝanculo atingas la urbestrajn fingrojn.



LIBROSERVO

Kulmino de jubileaj streboj

En la kongresejo okazis librofoiro. Prezentiĝis sabaton 588 titoloj — zorga selekto el la pli ol tri mil, kiujn disponigas la Libroservo de UEA. Aldoniĝis dum la semajnoj pliaj 163, el kiuj pli ol 50 tute freŝaj. Pli ol 100 diskoj, kasedoj kaj vidbendoj, ombreloj, kaheloj kaj la kutimaj diversaĵoj kontribuis al la riĉa vario. Al tiu etoso foje kontribuis ankaŭ la kolportistoj de nove (aŭ delonge) proponataj varoj.

La salono estis malferma dum 63 horoj. Pro tio la ritmo de aĉetado fluis sen stumbligaj premoj. Kunlaboris aŭtoroj kaj eldonistoj: Subskribis librojn Waringhien dojene, Lins (*La danĝera lingvo*), Berveling (*Laŭdo de l'stulteco*), Eichholz (*Esperanta bildvortaro*), Rossetti kaj aliaj. Juan Régulo prezidis la tablon de Stafeto, kien dum la semajno alvenis la rebinditaj *Proverbaro*, *Ni kaj Ĝi*, kaj la nun

definitive aperintaj *Patrina koro* de Nedelĉeva kaj *La granda Meaulnes* en traduko de Bernard. Kasini (Edi-studio) festis per devenlandaj vinoj du antologiojn, la italan kaj la aŭstralian. Jaŭdon anonciĝis la alveno de *Jubileo*, kaj Tonkin ĉeestis por subskribi la unuajn dekojn da ekzempleroj; la libro en du tagoj atingis la supron de la kongresa furorlisto.

Ŝajnas, ke la Centjariĝo fine plenumigis la eldonon de kelkaj longe atenditaj verkoj. Tiukiale la roterdama libro-servo — fakte la movada librofoiro — eble montris kulminon de eldonaj streboj, kian ni ne revidos dum pluraj jaroj. Ĝi servis kiel ekspoziciejo, ekzemple por la kolekto de Ludovikito kaj por la serio Oriento-Okcidento. Kaj oni amase aĉetis. Ne temas nur pri forporto kaj pago, kiu atingis pli ol 80 000 gld., sed ankaŭ pri mendoj poste plenumotaj, certe je rekordaj ciferoj. Entute grandioza estis tiu aranĝo, kiu montris signifan rekonturiĝon de la Esperanta libromerkato en la post-jubilea periodo.

Koncize pri...

Dokumentoj: Plej *utilis* eble la ampleksa urba prospekto pri Roterdamo; plej *allogis* la varbiloj de la 74a UK (en Brajtono), la tuj-antaŭa Pariza Freneza Semajno kaj la 75a UK (en Havano); plej *surprizis* la reklamilo pri anglalingva libro *Interlinguistics* (projekto de la komputfirmao BSO); plej *distris* senpaga reklamnumero de *Literatura Foiro*; plej *urĝis* la apelo de la porblindula Agado E3. Kaj tio ne elĉerpas la sakenhaston...

Kongresejo: Oni memoros la buntan foiron de nederlandaj metioj, la malferman sabaton; la vesperan aŭskultadon de la mondaj novaĵoj en Esperanto, pere de loka radiostacio; ankaŭ ĉe la unua etaĝo, la videofilmojn el Ĉinio kaj la raŭkan voĉon de Esperante parolanta komputilo. La vastaj spacoj, taŭgaj salonoj kaj fidindaj teknikaj servoj de la kongresejo estis inter la plej bonaj de iu ajn UK.

Bankedo: 350 gekongresanoj ĝuis agrablan etoson en tre taŭga ejo. La menuo estis impona (same kiel la prezo!), sed la kelneraro ŝajnis kolektita el la apudaj drinkejoj.

Balo: Bonega nederlanda danc-orkestro, bona movada muziktrupo ("Anda" el Pollando), plus diskoteko por iom da pop-muzika publiko, ebligis preskaŭ al ĉiu trovi adekvatan marmoran plankopecon por danci. Abundis sidlokoj por babili. Bufedoj bone funkciis. Denove praviĝis la enprogramigo de la Balo komence de la semajno, kie ĝi povas plenumi sian rolon kiel amikiĝejo, daŭrigo de la Interkona Vespero.

Fakkunsidoj: Pli ol tridek fakaj organizaĵoj aranĝis kunsido(j)n dum la kongresa semajno. Rekordis verŝajne la fervojistoj, kun 80 partoprenantoj el 18 landoj kaj aparta fakekskurso al la roterdama haveno. Menciindas ankaŭ la planoj restarigi juristan asocion (kontakto John Dale, 2251 Pimmit Drive, n.370, Falls Church, VA 22042-2822, Usono) kaj ekfundi sportan asocion (kontakto Gianfranco Polerani, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, Italio). Pluraj kunvenoj dediĉis apartan atenton al la terminologia laboro.

Fakaj vizitoj: Pli ol 150 kongresanoj faris fakajn studvizitojn al 7 diversaj entreprenoj kaj instancoj en Roterdamo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Kvankam tio postulas iom da ekstra organiza laboro, tiaj vizitoj meritas trovi sian lokon ankaŭ en la programo de la estontaj kongresoj.

Gazetara servo: Entute 80 nederlandaj ĵurnaloj, inkluzive la plej grandajn, aperigis sume ĉ. 150 artikolojn. Aldoniĝis du el la ĉefaj germanaj ĵurnaloj kaj unu-du belgaj kaj francaj. Ĉe la televido, elstaris 7-minuta novaĵelsendo kie rolis i.a. la parlamenta prezidanto Dolman. Kvin tutlandaj radiostacioj apudis la internaciajn elsendojn de Pekino, Varsovio kaj Zagrebo (en Esperanto, ĉiutage) kaj de stacioj en Berlino kaj Novjorko.



Ekumena diservo: Ĉirkaŭ kvincent gekongresanoj el diversaj kristanaj konfesioj partoprenis dimanĉe posttagmeze la ekumenan diservon en la roterdama ĉefpreĝejo (*foto*). Komuna disdonado de pano kaj vino, impona orgeno, detala programlibreto kiun ricevis ĉiu alveninto, kaj prediko de roterdama pastorino Jelly Koopmans-Schotanus pri la temo "Honoraj emblemoj aŭ cikatraj diademoj" faris la tuton modela kongresa aranĝo.

Antaŭkongreso kaj Postkongreso: Ambaŭ estis tre bone organizitaj kaj abunde internaciaj. Al la unua aliĝis ĉ. 40 personoj, al la dua 70. Gratulindas la lokaj grupoj en suda Limburgo (Antaŭkongreso) kaj Alkmaar (Postkongreso), kiuj per sia efika laboro ankaŭ sukcesis vekti multan gazetaran atenton.

Akcepto: La urban akcepton ĝuis nur 250 kongresanoj en la impona malnova urbodomo. Tie la skabeno pri edukado Simons surprizis la gastojn per longeta parolado en Esperanto. D-ro Tonkin ne nur sprite respondis sed ankaŭ utiligis tiun festan etoson por aparte saluti eminentan movadan ĉeestanton: Prof. Waringhien en tiu tago (la 29-a de julio) fariĝis 87-jara.

Centra Oficejo (CO): Helpe de senpagaj biletoj, kiuj difinis ne nur la daton sed ankaŭ la precizan kvaronhoron, centoj da kongresanoj vizitis la Centran Oficejon de UEA. Iasence ĝi fariĝis (kaj restas) la ĉefa "turisma" vidindaĵo de Roterdamo. Tie cetere okazis pluraj akceptoj dum la semajno, laŭvice: la Komitato de UEA, eksaj kaj nunaj geoficistoj de la Asocio, anoj de Societo Zamenhof kaj Patronoj de TEJO. Mankis iom la spaco, trois kunpuŝado, deficitis freŝa aero, plusis la ŝvito dum tiuj akceptoj. Kreiĝis tamen familiareco kun la asocia sidejo, kaj tio valorigis ĉiujn streĉojn por funkciigi kaj la kongresojn kaj la Domon samtempe tra la tuta semajno.

Ekskursoj: Preskaŭ 500 kongresanoj aliĝis al la urba ekskurso, dum pli ol 700 partoprenis unu el la 9 tuttagaj ekskursoj. Amsterdamo, proponita en du ekskursoj, logis preskaŭ 300 kongresanojn. Deko da birdamantoj postkongresis sur la insulo Texel, dekkvino da aliaj ĝuis 3-tagan postkongresan vizitadon de famaj nederlandaj muzeoj, sub lerta gvido de f-ino Vermaas, iama direktorino de la CO.

Dua Terminologia Konferenco: Kvindek personoj partoprenis la 2-an konferencon de Terminologia Esperanto-Centro, kiun gvidis d-ro Detlev Blanke. Ĝis nun aliĝis 115 fakuloj el 28 landoj; ĉe TEC estas reprezentataj 14 fakaj kaj 17 landaj E-asocioj, krome 4 nemovadaj institucioj. Prof. Stop-Bowitz anoncis, ke estas jam plano pri reviziado de PIV; en septembro de 1989 oni organizos dusemajnan terminologian kurson en Pisanica (Bulgario), sed por tio bezonas materialojn; post duonjaro estos preta skriba formo de terminologia kurso, kiun preparas TEC kunlabore kun Ĉefna Esperanto-Asocio.

Babilaĵo kun “ne-fakulo”

Teknikisto de la kongresejo, parolante al LKK-ano dum momenta ripozo en la “artista kafejo”:

“Mi ne estas muzik-recenzisto. Mi ne estas ĵuriano pri Artaj Premioj. Sed mi laboras, jam dum pluraj jaroj, en ĉi tiu muzik-teatro. Mi do vidis kaj aŭdis multajn artistojn: instrumentistojn, kantistojn, dancistojn. . . . Ion tian, kia via Arta Programo, mi ankoraŭ neniam vidis.

“Mi ne scias, ĉu oni povas nomi tion Esperanta kulturo. Mi rimarkis nur, ke preskaŭ ĉio okazas en via lingvo. Kaj ke la aŭskultantoj venas el multaj landoj kaj komprenas. . . . Rilate la kvaliton — memoru ke mi ne estas recenzisto, mi nur multon vidis kaj aŭdis — mi povas diri nur, ke ĉiuj viaj artistoj (krom tiu unu, amatora) apartenas almenaŭ al la bonaj profesiuloj. Ĉi tie ne temas pri gusto. Iuj ŝatas bulgaran opero-stilon, aliaj ne. Sed temas pri eble tamen ekzistantaj ‘objektivaj’ kriterioj pri kvalito. Tiam oni povas aŭdi ke tiu malgranda bulgarino ja havas voĉon! kaj ja scias kanti! . . . Mi aŭdis kaj vidis eĉ iujn, kiuj apartenas al la pintaj prezentaĵoj dum la lastaj jaroj en ĉi tiu konstruaĵo. . . .

“Nu, tiel mi opinias, sed mi ja ne estas fakulo.”

wfp

NACIA VESPERO:

“Kajto” estis perlo

Oni diras: sidigu lin en la unuan vicon, kaj li aplaŭdos kion ajn. Mi sidiĝis en la kvinan. Tamen dum la Nacia Vespero estis multaj momentoj, kiam ne aplaŭdi estus nur snobece.

Tenero, mildo kaj kvieto, kiun elradiis la pianludado de flandra artisto Geert Dehoux, bone harmoniis kun antaŭimagoj pri Nederlando, kiel regno de akvo, floroj kaj trankvilo. Similan etoson kreis ankaŭ la kantoj, plenumitaj de M. Angelova (Bulgario), G. Staneŝnikova (Sovetio), kaj harpo-baritona duopo S. Veen kun A. de Ruyter. Iom aparte staris danc-poemo, animita de N.v.d. Eekhout. Taksi ĝin mi tute ne kompetentas, sed laŭ kelkaj spektintoj, tiu ero estis tre sukcesa. Sendiskutan bonvenigon ricevis ceteraj ĉarmaj malglataĵoj de la vespera programo.

Tamen, ĉu ni eltrovis ĉi-foje ian perlon? Mi kredas, ke jes. Ĝi nomiĝas “Kajto”, konsistas el kvar profesiuloj kaj amatoroj, kaj karakterizeblas per jena fakteto. Tuj post la koncerto iu el la spektintoj venis al la ensemblanoj kun la deziro aĉeti dekon da iliaj diskoj kaj kasedoj (kiuj fakte ekzistas en la nederlanda lingvo). Do, ni atendu nian vicon, ĝuinte la malkovron de plia plaĉaĵo en la gastiga lando.

am

TEATRO:

Furoras la BET-isma tradicio

La vorton “BET-ismo” inventis mi mem. Tamen ĝian enhavon la esperantista popolo ĝuas jam 30 jarojn. Jen kun helpo de Ŝekspiro, jen de Arbuzov, kaj ankaŭ de

P. Panĉev, el kies verkaro la Bulgara Esperanto-Teatro (BET) elektis por la nuna kongreso *Fabelo pri kolpakoj*.

Unu el la protagonistoj de tiu fabelo diras: “Eĉ por la palacoj reĝaj mi ne ŝanĝus vin.” Tiu formulo plene taŭgas por la kolekto, kiu daŭre konservas siajn tradiciojn: kaj se temas pri la profesieco en aktorado aŭ reĝisorado, kaj koncerne la elekton de surscenigotaj dramoj. Tio povas plaĉi aŭ ne, sed almenaŭ ĉiu spektanto scias, ke lin aŭ ŝin ne surprizos iaj modernaj dubindaĵoj kaj riskecaj eksperimentoj. Eble pro tio la spektakloj de BET ĉiam estas varme akceptataj. — La ĵaŭda Teatra Vespero ne estis escepto.

am

PUPTEATRO:

Plia bono el Bjalistoko

Kvarfoje dum la semajno, en tre mallarĝa spaco dum preskaŭ horo kaj duono, proksimis spektantoj kaj aktoroj en italeska etoso inspirita de verkoj kaj personoj el la 14-a jarcento. La profesia bjalistoka teatraĵo *Dekamerono 8½*



FILMO:

Necesas tamen kompreneblo

Esperantlingva kin-arto apenaŭ ekzistas. Krom la glora, primitiva *Angoroj*, ĝi limiĝas precipe al malmultaj, mallongaj videobendoj. Oni povas tamen supozi ke, same kiel en la skriba literaturo multaj tradukoj poluras la lingvon kaj levas la kvaliton de la originala verkado, la esperantigo de bonaj, famaj nacilingvaj filmoj havos la efikon iam nas-kigi originalan kinarton. Pro tio la dublado de la Oskar-premiita hungara filmo *Mefisto* de István Szabó estas laŭdinda iniciato, nepre subteninda per aĉeto de la bendo.

La elekto de ĝuste tiu filmo, la ĉefa ero de la Filma Vespero en Roterdamo, estas jam en si mem sufiĉe taŭga. Ĝi estas konata verko, kiu siatempe akiris grandan renom tra la tuta mondo. Ĝia intrigo estas simpla: ĝi rakontas la historion de unu el la plej famaj germanaj aktoroj, kiu cele al daŭrigo de sia profesia kariero pli kaj pli kom-

tiris sian temaron de kvar rakontoj el la novelaro de Bokaço. Precipe impresis la polajn aŭtorojn de la teksto la famo de *Dekamerono* kiel kolekto de maldecaj anekdotoj: ĉio, kio okazas sur la scenejo, havas eksplicitan rilaton kun seksaj aktivecoj, en la nomo de naturo, kio certigas la transdaŭron de la homa specio per tiom agrabla rimedo.

Kapturnige la voĉoj de la aktoroj venas jen rekte el iliaj buŝoj, jen el la scenej-malantaŭo, kaj la pupoj — ĉar ja temas pri pupteatraĵo — ekestas en la plej genie simplaj manieroj. Jen do ŝak-figuroj moviĝas tra la fenestroj kaj pordoj de vertikala ŝak-tabulo. Jen fruktoj iĝas kapoj kaj gantoj iĝas vestaĵoj de tuta familio el patro, patrino, filino kaj ... amoranto de la filino. Jen elementaj pup-kapetoj alkroĉitaj al la aktor-brakoj, kun manikoj kiel vestaj ornamoj, okazigas la aventuron de ĝuema triopo. Kaj daŭre la aktoroj sukcesas per siaj manoj kaj voĉoj kaj movoj samtempe ĉeesti kaj forgesigi sian pupistan rolon en senhalta sinsekvo de eltrovoj kaj surprizoj.

Cetere, ni esperantistoj jam alkutimiĝis, ke bonas kio venas el Bjalistoko...

gc



Maldekstre, la bjalistokaj malpruduloj amuzis kaj mirigis en Dekamerono; supre, la kubanoj invitis havanen.

INTERNACIA VESPERO:

Laŭdinda leĝereco

La roterdaman kongreson markis i.a. la apero en Esperanto de *Laŭdo de l'stulteco* de Erasmo de Roterdamo. Ĉe li la "stulteco" estas tio, ke la pasioj superas la sekan racion, kaj li estas ege dankaj, ke ni homoj estas ĉefe stultaj. La kongresanoj havis multajn kialojn por esti same dankaj, kiam la Internacia Vespero prezentis la tre riĉan nunan gamon de diversaj stultoj. Ni ĉiuj estis jam tro farĉitaj per diskutoj kaj ideoj, kaj la malsolida fluo de la pasioj revigligis nian akceptemon.

Estis originalaj kantoj — kaj kantado — de Ĵak le Puil kaj tradukitaj kantoj de bulgaroj (Karamfilka Adamova, Galja Kostova) kaj ĉeĥoj (Miroslav Smyčka, Josef Vích); alterne akompanis kaj solpianis la rusoj (Jelena Puĥova, Galina Staneŝnikova). Poste muzikis la kubanoj, Miriam Ramos kante kaj Carlo Luis gitare. Por la pasimeuloj, la Internacia Vespero certe plifortigis la emon partopreni la havanan UK en 1990; ĉu slavan UK iom poste?

Kun la arto de Saskia Veen jam konatiĝis ĉiu en la Inaŭguro: ĉu necesas diri ke ĝi aparte plaĉis? Ĉi-foje kune rolis la agrabla tenorvoĉo de Edward Hoepelman. Tute alian arton, la klasikan ĉinan korpekcercadon "tajĝiĉjuan", prezentis Li Changduo en bonvena azia ero inter multe da Eŭropo, kaj unike Esperantan internaciecon reprezentis la dumkongresa ĥoro sub gvido de Dimitr Terziev (Bulgario).

Aparte brilis la homa stulto en la unuaktoraj skeĉoj kiujn verkis kaj prezentis Stefan MacGill. La konkurenca fanfaronado pri malverŝajne malriĉaj infanaĝoj, kaj la dramigo de plena Esperanta fonetikeco per formo-imitaj interpunkciaj blekoj, al mi ege plaĉis; sed parolas ĉi tie malnova kolego kaj ŝatanto de Stefan, kaj eble ne tute objekte. Estis tamen evidente, ke la ĉeestantoj multe ridis, kaj mi kuraĝas konjekti, ke ridis ankaŭ tiuj, kiuj poste elprenis kritikistajn okulvitrojn kaj malstulte decidis ne akcepti la prezentojn kiel "arte" bonajn. Ĉu ne pli konsiderindas la artisma celo?

pd

promitiĝas kun la nazia reĝimo, ĝis li iĝas nur pupo dancigata de la reĝimaj eminentuloj. Tiajn rakontojn ankaŭ esperantistoj devus koni, eĉ nur por eventuale kompari la sintenon de diversaj partoj de nia movado fronte siatempe al la sama reĝimo.

Tamen la finita produkto spektita en Roterdamo montris plurajn mankojn, verŝajne neeviteblajn en senprecedenca pioniraĵo. Mi mem, kaj ĉiuj ĉeestintaj spertaj esperantistoj kiujn mi demandis pri tio, sukcesis kompreni la dialogojn nur dank' al memoro de nacilingvaj prezentoj — kaj pri tio ne kulpis la akustiko de la salono. La dublantaj aktoroj devis elbuŝigi en malmulte da tempo tro longajn frazojn: tio estas la unua faktoro kiu kondukis al nekompreneblo. Ĉu estas saĝe klopodi senspire kaj fulmrapide eldiri "Ĝis la morgaŭa renkontiĝo" dum normalrapida "Ĝis morgaŭ" sufiĉus kaj estus pli klare komprenebla? Tiaj langotordaj ekzercoj ankaŭ profunde malhomigas la recitadon: pro hasto oni ne sukcesas kapti la ĝustan tonon, la ĝustajn paŭzojn, la ĝustan stilon.

Krome, en nacilingvaj dubladoj oni ne miras, ke germana aktoro ekzemple parolas france, sed en Esperanto havas tre malbonan efikon aŭdi germanajn rolulojn prononci la lingvon kun peze hungara elparolo. Tia kromefiko devas nepre esti evitata en venontaj dublo-provoj. La aktoroj, kiuj dublis *Mefiston*, montras sian hungarecon multe pli peze ol la kutimaj spertaj hungaraj esperantistoj, kaj, preter la supremenciita malbona efiko, tio ankaŭ ĝenis la komprenon.

Tria faktoro de nekompreneblo estis la teknika kvalito de la dublado mem: la fona bruo estis ĉiam tre laŭta, kaj la parolo ne estas klare surbendigita, malgraŭ la fakto, ke la respondeca dublo-studio estas profesia.

Malgraŭ la listigitaj plibonigendaj aspektoj, la publiko en la fino aplaŭdis, por substreki sian subtenon al iniciato nepre ripetinda. Mi esperas ke *Mefisto*, spitante la komencajn malfacilojn, startigos tutan vicon da film-tradukoj, kiuj plimultigos la facetojn de la Esperanta kulturo.

Dario Besseghini (Italio)

Inter seriozeco kaj tempoperdo

La Komitato de UEA kunsidis sesfoje en Roterdamo, dum iom malpli ol 14 horoj. Tio kompreneble estas malmulto, kiam oni pensas pri la komplikeco de la hodiaŭa Esperanto-movado: 14 horoj da diskuto en tuta jaro! Ĉi-jare la Komitato almenaŭ okupiĝis pli pri gravaj principaj demandoj, ol pri nerealaj projektoj kaj etaj detaloj; d-ro Tonkin eĉ aparte laŭdis ĝin pro ĝia seriozeco. Restas tamen multaj kritikoj, kaj kelkajn el ili ni pretere mencias ĉi tie.

La plej gravaj kunsidoj okazis post la kongresa fermo; dum la antaŭa semajno funkciis kongresaj komisionoj pri rezolucioj, honoraj membroj, la tria (praktikisma) celo de UEA kaj organizaj demandoj, krome la jam ekzistantaj komisionoj pri financo kaj ekologia statut-amendo. Okazis ankaŭ la kutima kaj leĝe necesa Unua Ĝenerala Kunsido, posttagmeze de la inaŭgura kongresa tago. Ĉe tio, tre sukcesis la unua parto pri "omaĝoj" (vd. p.144); utilis mallonga prezento de Probal Daŝgupto pri la kongresa temo; sed komplete fiaskis la diskuto pri la Estrara Raporto 1987. Esence flankaj demandoj, kiel detaloj pri profesia reviziado; klarigo-petoj pri aferoj, kiujn devus jam scii la demandanto; miskomprenoj pri la celo de la kunsido: ĉio ĉi, flanke de kaj la publiko kaj la komitatanoj, malhelpis ke oni traktu pli ol kvin ĉapitrojn en la disponebla tempo. La ceteron oni relative rapide forbalais en frumatena kunsido antaŭ la kongresa fermo.

Ni venu al la diversaj decidoj, kiujn faris aŭ ne faris la Komitato en la lastaj sabato kaj dimanĉo. En kelkaj kazoj temis esence pri aprobo de jam (bone) farita laboro: nova Kongresa Regularo, regularo de la Internaciaj Ekzamenoj, nova komisiono pri eksteraj rilatoj, aliĝo de Internacia

Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo kaj Internacia Kooperativa Esperanto-Organizo kiel kunlaborantaj fakaj asocioj, reciproka agnosko kun Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, fermo de la kongresaj kontoj de Aŭgsburgo (1985) kaj Pekino (1986). Iom aparte ni mencias la subtenan rezolucion pri la Monda Esperanto-Centro en Bjalistoko (p.154): ties unuanima adopto spegulis fortan kreskon de kunlaboremo dum la kongresa semajno, kiam al ĉiu evidentiĝis la seriozeco kaj bonvolo de la bjalistokanoj. (Vd. p.154 por pliaj detaloj.)

Okazis ankaŭ la tradicia stampado de dumkongresaj rezolucioj kaj raportoj. Tiu ĉi labortereno estas pli problema, ĉar malmultaj sentas sin kompetentaj kontraŭstari, aŭ serioze priesplori, la rekomendojn de komisiono: tial trapasas sendiskute sufiĉe pezaj decidoj. Ni ekzemplu per la kongresa komisiono pri organizaj demandoj. El ties tri rekomendoj, unu — ke la Estraro "faru analizon de la kosto de ĉiuj agadoj, kiuj rekte aŭ nerekte influas la financajn rimedojn de la Asocio . . . [surbaze de] sistemo de fakturado de servoj flanke de la Centra Oficejo kaj aliaj instancoj" — implicas kaj enorman laboron por fari la analizon, kaj gravegan ŝanĝon en la organizo de la CO (kiu nun nur parte funkcias laŭ distingeblaj servoj kaj uzas tute alian sistemon de librotenado). Eble tia restrukturado indas, sed ŝajnas senrespondece, fari tian rekomendon sen agnosko de ĝiaj kosto, kaj eĉ malpli bone, akcepti ĝin sendemande.

Simile sendiskute, laŭ la rekomendoj de la restarigita Komisiono pri Financo (KF), la Komitato renversis la varsoviajn decidojn pri elekto de estrarano pri financo (la posteno restos vaka dum ankoraŭ unu jaro) kaj profesia revizorado de la kontoj (KF transprenos respondecon de la trovita firmao). La kategorio Membro kun Gvidlibro restos ankoraŭ du jarojn.

Unu el la plej gravaj eroj de la roterdama tagordo estis ŝanĝo kaj adopto de la buĝeto 1989, kiu en sia provizora formo montris deficiton de 72 000 gld. Malgraŭ la antaŭaj



atentigoj de la Estraro, kiu eksplicite petis ke la komitatanoj konsilu kiel solvi la problemon, granda plimulto de la komitatanoj eĉ ne kunhavis sian kopion de la buĝeto. Ricevinte novajn kopiojn, ili unue diskutis, ĉu redukti la salajrojn per maldungo de du oficistoj (kvin poraj voĉoj, inkluzive de la komitataj revizoroj kaj la kasisto de TEJO), kaj poste decidis simple redoni la problemon al la Estraro — kiu tiuvespere sukcesis redukti la prognozan deficiton ĝis 23 300 gld., per tranĉoj kaj aldonoj en diversaj lokoj.

Tamen, kiel ni diris komence, okazis pli da principa diskuto ol kutime. Tio ĉefe rilatis al la nova Strategia Plano, prezentita de la Estraro, kiun la komitatanoj povis legi dum la kongresa semajno. Ni klopodos redoni ĝian esencon en la oktobra-novembra numeroj de *Esperanto*; ĉi tie, ni notu nur ke la Komitato ĝenerale aprobis la novan formon — pli principan, tempe nelimititan — sed faris plurajn kritikojn pri la enhavo. Oni do atendas detalajn reagojn de komitatanoj kaj aliaj interesatoj (laŭ peto en venonta revunumero). Surbaze de tiuj reagoj, la Estraro revizios la Planon kaj re-prezentos ĝin por formala adopto ĉe la Universala Kongreso en Brajtono.

En Brajtono ankaŭ okazos la elekto de novaj komitatanoj, kaj poste de nova Estraro de UEA. Ne estas senimplike por tiuj elektoj, ke ĉi-jare la Estraro ne trovis taŭgan kandidaton por la honorigo “plej aktiva komitatano de la pasinta jaro”. Ankaŭ laŭ la vortoj de la Komitata Elektokomisiono: “Reagis [al la peto kandidatigi komitatanojn C kaj estraranojn] 12 komitatanoj (plus 3 de la Elektokomisiono). ... Ĝis nun venis nur 3 konkretaj proponoj kun la necesaj du komitatanaĵaj subskriboj el malsamaj landoj. ... Por havi sufiĉe da taŭgaj proponoj por elekti estraron 1989, la Komitato devos konsiderinde pliaktivigi.”

Ĉu necesas aldoni, ke aktiva instigado al viaj komitatanoj estus same tre bonvena?

Mark Fettes



KONGRESA FERMO

Regis familia etoso — ĉu do sukcese?

Kongresaj fermoj tradicie kaj utile servas al videbligo de la kongresa laboro. Ankaŭ ĉe tiu ĉi, oni provis resumi la enhavon de pli ol 160 diversaj programeroj; kaj ĉar la plimulto de tiaj informoj troviĝas alipaĝe, nia resumo de la resumo restos konvene skiza. Temis, laŭ la takso de la prezidanto de UEA, pri kongreso aparte *sentumulta*, markita de familia etoso nesuperita dum la lastaj jaroj. “Nek mi memoras kongreson, en kiu tiom da homoj ĉeestis la diversajn aranĝojn,” deklaris Tonkin, tiel dementante unu el la tezoj, kiujn ni proponis enkonduke al ĉi tiu numero.

Pri la programo parolis la ĝenerala sekretario de UEA, d-rino Flóra Szabó-Felső, kaj sekve la rezolucion pri la kongresa temo prezentis ŝia kolego prof. Haszpra. Pri aliaj kongresaj atingoj koncerniĝis s-ro Edward Symoens (la nove elektita prezidanto de ILEI), kiu persone transdonis atestilon al unu el la afrikaj sukcesintoj ĉe la dumkongresaj ekzamenoj, kaj la ĝenerala direktoro de UEA, Simo Milojević, kiu laŭtlegis la rezultojn de la Belartaj Konkursoj 1988 (vd. la venontan numeron).

Post muzika paŭzo eminente taŭga por allogi nin post du jaroj al Havano, d-ro Tonkin reprenis la temfadonon ĉe la Monda Esperanto-Centro en Bialistoko. Kune kun la tri ĉeestantaj gravuloj de la regiono — kiuj onidire lernis po unu triono de Esperanto dum la semajno, tiel ebligante funkcipovan komunikadon — li lotumis du pliajn vojaĝojn al la zamenhofa naskiĝurbo: s-roj Nikolaj Uzunov (Bulgario) kaj Medardo Biaggi (Italio) tiel aliĝis al siaj aŭkciaj samŝancanoj (vd. p.154).

Al la Honora Patrona Komitato de UEA oni bonvenigis novan esperantiston-eminentulon: la jugoslavian lingviston D. Brozović. La liston de Honoraj Membroj eniris ĉi-jare nederlandanoj G.F. Makkink, O. Hoekstra kaj A.J. Middelkoop, I. Bacskai (Hungario) kaj G. Kühlmann (Danlando); biografioj de ĉiuj novaj honoritoj troviĝos en la oktobra numero de *Esperanto*.

Fine venis la dankoj: al la Alta Protektanto kaj la Honora Komitato de la Kongreso, al la Loka Kongresa Komitato kaj la stabo de la Centra Oficejo, kiuj kune kun armeeto de helpantoj reĝisoris tiun ĉi escepte glatan UK, al la laborantaro de la kongresejo, al la roluloj ĉe la artaj aranĝoj, ktp. Faskego da rozoj, transdono de flago, dirigentado de Dimitar Terziev (estro de la Internacia Esperanto-Ĥoro) dum la lasta kantado de *La Espero*, kaj fermiĝis la unua post-Jubilea Universala Kongreso de Esperanto. De la tradicia recepto ĝi estis pli-malpli perfekta ekzemplo; sed ĉu tio ne jam starigas la defion, preteriri la klasikajn limojn al nova kongresa kuirarto? Aventuro aŭ aŭdaco maloftas en niaj tradicioj, sed ĉu la fruaj jaroj de nova jarcento ne taŭgas por ioma eksperimentemo? La torĉon al vi, Brajtono!

Fora maldekstro: La aro de inter kvindek kaj sesdek komitatanoj necesigas fremdige grandan salonon por la kunsidoj. Apude, LKK-anoj (fone) kaj centraoficistoj (proksime) ricevas dankojn dum la Fermo.

Kongreseroj

Ĉu -io aŭ -ujo? Postkongresa studado de la UK-aligiloj elmontris, ke *-io* estis vaste preferata de la kongresanoj por iliaj landnomoj en tiuj kazoj, kie *-ujo* ankaŭ eblus. Eĉ se oni ellasas Jugoslavion, Ĉeĥoslovakion, kaj kelkajn aliajn landojn ĉe kiuj la koresponda formo ne ekzistas, estis pli ol duoble pli da ioemuloj en la kongresejo. Nur la britoj kaj hispanoj montris ujan preferon. Polio timeme debutis, kaj Danio plene rivalis Danlandon — sed la svisoj, finnoj kaj “nederroj” venis senescepte el siaj respektivaj -landoj.

Komitato kaj pupteatro: La brila Bjalistoka Pupteatro kaj ĝia *Dekameron* 8,5 donis al la organizantoj de la 73-a UK amason da problemoj. Temis simple pri la ejo en kiu la Pupteatro ludu. Oni unue planis, ke tio okazu en la Salono Grabowski, poste en la Salono Lapenna, fine denove en Grabowski (tiel aperis en la Kongresa Libro) — por ke la pupteatraĵo finfine prezentiĝu en la Salono Hodler. Sed, Hodler ja estas tradicie la salono en kiu kunsidas la Komitato de UEA. Kaj estis tiel: la Komitato kunsidis kun pupteatra dekoro en la fono. Kelkaj tagordaj punktoj de la Komitato impresis kvazaŭ pupteatraĵoj. Eble tio eĉ estis la ĝusta dekoro por la plej supera organo de UEA.

Akademio 3: La batalo daŭras. Post la sanga Milito de Ata-Ita kaj la longjara gerilado pri landonomoj, leviĝis ĉi-jare alia temo por ĝeni la pacon de la ĉefa Esperanta lingvo-institucio. Temas pri la esperantigo de propraj nomoj: neakademiano Rikardo Ŝulco elektas fari tion konsekvence, dum akademianoj De’ Giorgi kaj Bernard preferas lasi ilin senŝanĝaj. Kun aldono de interparenteza proksimuma Esperanta prononco, preferas Stop-Bowitz (step-bovic), dum Ajĥolc (Eichholz) proponas la uzadon de Esperanta transskribo kun foja interparenteza aldono de la origina nomo. La prezidanto Al-Ba-Ult mem ne malkonsilis la legadon de la originaj skribformoj rekte per la reguloj de Esperanta fonetiko. Ĉiu ŝajne supozis, ke la origina skribformo estus latinlitera; ĉu tio eventuale diras ion pri la nuna konsisto de la Akademio?

Urbodomo en Esperanto: La invititojn al la Akcepto en la Urbodomo de Roterdamo agrable surprizis la fakto, ke la skabeno pri edukado faris tie longan paroladon en Esperanto. Tio tamen estis nur bela epilogo de tuta dramo, kiun spertis la Centra Oficejo rilate la Akcepton. La urbodomo vokis la oficejon meze de julio por komuniki, ke la lingvo de la akcepto estos la angla. La oficejo rifuzis. La urbodomo insistis. La oficejo montriĝis senkompromisa kaj diris al la urbodomo: “Se vi ne volas organizi ĉi tiun akcepton laŭ niaj principoj, kio inkluzivas alparolon en la nederlanda, tiam ni dankas kaj ne volas havi la akcepton.” Kelkajn tagojn poste venis la teksto de la parolado, kun peto traduki ĝin en Esperanton.



Vesto formala ne necesas: Restas mistera la kongresnumero de nuda vizitanto al la urbodoma akcepto. Eksteraj signoj tamen suspektigas, ke temas pri unu el la grekaj delegitoj, iomege sportema, kredeble proksima al la TEJO-aĝlimo. Konantoj bonvolu kontakti la estraron pri kongresoj.

Inter agaco kaj tenaco: Novan kongresan ludon provizis la ĉi-jara Kongresa Kuriero, redaktita de la *Esperanto*-teamo. Temas pri la titoloj de la ses numeroj, kiuj — honore al la Centra Oficejo — finiĝis ĉiam per la samaj du literoj: *Prefaco*, *Komenco*, *Hejmeco*, *Laco*, *Paco* kaj *Apreco*. Tio ne nur stimulis divenadon de la venonta nomo flanke de multaj kongresanoj, sed helpis inspiri parodian numeron — *Ŝerco* — kiun ne produktis la CO...

Baldas fruis 43 tagojn: Kvankam la CO petis, ke la kongresanoj ne uzu la sidejon de UEA kiel valizdeponejon nek pensu, ke ĝi estas hotelo, pluraj agis male al la peto. La plej rimarkinda inter tiuj estis Fregonara Baldas N’xingui-Kanga el Angolo: li venis “al la Kongreso” jam la 10-an de junio, 43 tagojn tro frue. *Baldi* nun fariĝis nova verbo en la CO-slango, kun la signifo: veni tro frue ien.

Literaturo aŭ vitikulturo? Bruĉjo Kasini, la estro de la konata itala eldonejo Edistudio, festis la lanĉon de du novaj antologioj — la itala kaj la aŭstralia — dum la kongreso per gustumado de devenlandaj vinoj. Laŭdire oni forte instigas lin daŭrigi tiun serion per la franca...

Tomboŝtono por Ivo Lapenna

Pluraj esperantistoj sugestis, ke ni lanĉu mondiskalan kolektadon cele doni al "la heroo de Montevideo" indan rememoron.

Amikoj de Ivo Lapenna, kolektiĝu por ke ni povu doni al li tomboŝtonon indan al lia rememoro. Sendu vian kontribuon al la suba adreso. Se ni ricevos ĝin antaŭ la 15-a de oktobro 1988, kiel kvitanco via nomo aperos en nia libreto pri Ivo Lapenna eldonota en novembro.

Nia libreto verkita de multnombraj simpatiantoj de Prof. D-ro Ivo Lapenna estas mendela ĉe la suba adreso. Prezo: 50 d.kr. + sendokostoj.

Poŝtĉekkonto: Kopenhago 1 19 06 01

Peter Zacho, Nørregårdsvej 91, DK 2610 Rødovre, Danio

La perlo de la finna literaturo

KALEVALA



Per la majstra traduko de J.E. Leppäkoski kun postparolo de Vilho Setälä kaj la originalaj bildoj de Akseli Gallen-Kallela en nova kaj luksa grafika aranĝo.

Serio Oriento-Okcidento n-ro 4

"Tia libro valorigas lerni la internacian lingvon kaj ĝi nepre ne manku en la biblioteko de iu ajn Esperanto-klubo. Individuoj prefere rezignu pri pluraj aliaj libroj" (MONATO 3/86).

Eldonis: Esperanto-Asocio de Finnlando/ Helsinki 1985, 392 p., ilus., bindita, ISBN 951-9005-51 X.

Prezo: 45,00 gld. aŭ 95 FIM + sendokostoj. Mendu ĉe la libroservo de UEA aŭ rekte ĉe la eldoninto.

Fokuso

*Kvaronjara
popularscienca
magazino*

64 paĝoj, 22 × 15,5 cm
Jarabono ĉe UEA 24 gld.

SENPAGA PROVEKZEMPLERO:
HEA-FOKUSO, Pf. 193, H-1368
Budapest, Hungario

ĈU LA HOMARO TRAVIVOS LA NUKLEAN EPOKON?

Legu **LA RESPONDON DE DIO**. Petu la senpagan libreton de Internacia Biblia Misio, 29 Plantation Road, Poole BH17 7LN, Britio.



COVALEX S.A.

Chemin des Voirambeys
Chalet "Les Cascades"
CH-3974 MOLLENS
Svislando

Serĉas importi rekte el fabrikanta lando:

malmultekostajn ● 3 ½" kaj 5 ¼" DS/DD disketojn "IBM-kongruajn"

● "IBM-kongruajn" komputorojn, porteblajn, kun likva-kristala ekrano, 1 aŭ 2 disketlegiloj, ĉiuj naciaj klavaroj, por lernejoj.

Serĉas eksporti kaj traduki en ĉiuj landoj kaj lingvoj:

la propran komputorprogramon pri tajplernado serioze faritan de gefakuloj.

Por ĝia agado "mara agentejo":

serĉas ĉiam, tutmonde kaj ĉiutage ŝip(et/eg)ojn por aĉeti/vendi, lui/luigi okaze de libertempo, laboro ktp... eble ni jam konas la aĉetiston aŭ la vendiston de la ŝipo kiun vi posedas aŭ pri kiu vi revas... kaj plue ni organizas, en Sud-Francio aŭ en la princejo Monako, ĉion pri maraj aferoj: surŝipajn kunvenojn, luigadojn/luadojn surmare aŭ enhavene, subakviĝadon, doganajn kaj flagajn formalizaĵojn.

NI KLOPODAS KOMERCI ESPERANTE, NE HEZITU KONTAKTI NIN SKRIBE EN SVISLANDO.

Ni volegas energie labori internacie kaj pro tio, ni havas bankkontojn en Benelukso, Monako, Svislando kaj plue unu komercan kompanion "Jersey (C.I.) Limited Liability Cy (1861-1968)" por solvi la transitajn aferojn.

Se vi maltrafis la UK, ne maltrafu ties rikolton!

Tuj antaŭ, kaj eĉ dum la 73-a Universala Kongreso
en Roterdamo, aperis la jenaj titoloj ĉe UEA:

Laŭdo de l' stulteco

Erasmus de Roterdamo, tradukis G. Berveling

Fama filozofia verko, kies moka atako kontraŭ
la tirana raciismo restas ankoraŭ profunde valora.

111 p. 21 cm. Prezo: 30,00 gld.

Infoduktoj

Luc De Brabandere, tradukis BSO-kolektivo

Vojmontra libro, kiu konatigas la anojn de lingva
revolucio kun la informa revolucio jam okazanta.

142 p. 21 cm. Prezo: 30,00 gld.

Jubileo – jarcento de Esperanto

redaktis Mark Fettes

La definitiva resumo de la Centjariĝo de Esperanto:
artikoloj, raportoj kaj multaj fotoj el la tuta mondo.

162 p. 24 cm. Prezo: 57,00 gld.

**UEA krome estas la sola distribuanto
de la jenaj novaj titoloj el aliaj eldonejoj:**

La danĝera lingvo

Ulrich Lins

Mejloŝtona verko pri la persekutoj kontraŭ Espe-
ranto – esenca ero en la libroteko de ĉiu movadano.

546 p. 19 cm. Prezo: 66,00 gld.

Patrina koro

Nevena Nedelĉeva

Simplaj, romantikaj rakontoj pri la esperantista vivo.

147 p. 17 cm. Prezo: 12,00 gld.

La granda Meaulnes

Alain Fournier, tradukis Roger Bernard

Romano pri “la verda paradizo de amoj knabnaivaj”.

222 p. 21 cm. Prezo: 30,00 gld.

Nove haveblaj estas ankaŭ tri gravegaj verkoj:

Ni kaj Ĝi

Gaston Waringhien

Eseoj III: 27 eseoj pri religio kaj arto.

344 p. 22 cm. Prezo: 45,00 gld.

Proverbaro esperanta

L. L. Zamenhof

La plej bona eldono iam preparita de la 2630 zamen-
hofaj proverboj, nete presitaj en alfabeto ordo kun
indeksoj, la originalaj antaŭparoloj, kaj enkonduko
kaj postparolo de Gaston Waringhien.

167 p. 19 cm. Prezo: 18,00 gld.

Esperanta bildvortaro

Rüdiger Eichholz

Esperanta versio de la mondfama vortarego Duden.

Ideala referaĵo por fakterminoj.

880 p. 20 cm. Prezo: 90,00 gld.

**Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Al ĉiu prezo aldonu 10%
por sendokostoj. En Nederlando aldonu 6% por enlanda im-
posto. Triona rabato ekde tri ekzempleroj por ĉiu el la supraj
titoloj krom la bildvortaro, por kiu sesona rabato aplikiĝas.**

“Stafeto”-serio prezentas:

Beletro, sed ne el katedro

Gaston Waringhien

Ĉu vere ekzistas esperanta literaturo? Ĉu eĉ ekzistas esper-
anta literaturscienco? La nestoro de l' esperantaj literatur-
istoj instruos, en agrabla, klara, prilaborita stilo, pri la
atingaĵoj de esperantaj verkistoj kaj tradukistoj. Fakte
temas pri simplaj klarigoj de altnivelaj artaj rezultoj.

Beletro, sed ne el katedro: (reviziita eldono de *Eseoj I*) 263 p., 630
bfr./34,50 gld. + sendokostoj. Mendu rekte ĉe Flandra Esperanto-
Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libro-
servo de UEA.



La unua Esperanto-grupo de la mondo invitas al la 100-jara fondiĝjubileo Nürnberg, 22 oktobro 1988

La jubilea aranĝo okazos en la kadro de la aŭtuna
kunveno de Bavara Esperanto-Ligo 21-23 oktobro en la
Restoracio Kulturverein, Nürnberg.

La partoprenantoj ĝuas konsiderindan rabaton: por du
tranoktoj en moderna hotelo en dulita ĉambro kun duŝo kaj
necesejo, abunda matenmanĝo, urba gvidado kaj tag-
manĝo (Nürnbergaj kolbasoj), oni pagas nur 115 germanajn
markojn.

Aliĝiloj haveblas ĉe: Esperanto-Grupo Nürnberg, Pirck-
heimer Str. 11/I, D-8500 Nürnberg 10; aŭ de Bayerische
Esperanto-Liga e.V., Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg.
Pagojn ĝiru al: Poŝta ĝirkonto 625 59-801 München,
Bayer. Esperanto-Liga e.V.

“Stafeto”-serio prezentas:

Kazinski venas tro malfrue

Deck Dorval

Kial stabilanima kaj persistema viro, sukcesa inĝeniero
farus murdon? Kaj, se li decidus fari ĝin, ĉu li estos sufiĉe
inĝenia, ĉu li ekzakte kalkulos siajn ŝancojn, elektos la
rimedojn kaj zorgo kaŝos la spurojn por fari senmankan
murdon, kaj tiel trompos la famkonatan inspektoron
Ksavero Kant?

Kazinski venas tro malfrue 176 p., 445 bfr./23,40 gld. + sendokostoj.
Mendu rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000
Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libroservo de UEA.